


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 595 (6)

JUNIO 1955



La Esperantista Kulturdomo,
Kastelo de Grésillon,
Baugé (Maine-et-Loire), Francujo

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Helpredaktoro : R. ROSSETTI
39 Willows Cres., Birmingham 12, Anglujo

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅛ paĝo 15 ŝil.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-kupono por ĉiu du da vortoj

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6250



Enhavo

	paĝo
La senco de la Jubilea Kongreso : <i>Hans Jakob</i>	177
Jubileo de Hans Jakob, 1905-1955 : <i>Hans Kürsteiner</i> ..	180
Baza laborprogramo de U.E.A.	186
Statistika promeno tra Jarlibro 1954 : <i>Emilija Lapenna</i>	192
La mirmekofagoj : <i>Ernest Paul</i>	194
Belarta Konkurso 1954 :	
Fraŭlina pudoro similas al oro : <i>G. C. Jervis</i>	189
Poezio :	
Poemoj de N. Kurzens	182
Rubrikoj :	
40-a Universala Kongreso, oficiala komuniko n-ro 7	179
Tra la mondo esperantista	183
Radio	197
Radio-babiloj : <i>S. S. de Jong</i>	198
Enigma konkurso n-ro 99	199
Novaj libroj	201
Internacia konkurso	206
Oficiala informilo	207

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 595

Junio 1955



La senco de la Jubilea Kongreso

DU monatojn post preso de tiu-ĉi numero de nia revuo la kvardeka Universala, la **Jubilea** Kongreso de Esperanto, estos realaĵo. Bulonjo 1905 kaj Bolonjo 1955, nur literŝanĝo, tamen kiom signifa por ni! 1905, deirpunkto de giganta agado de aro da idealistoj, firme konvinkitaj pri la bono de l' ideo; paŝo post paŝo ili kreis movadon kapablan impresi la skeptikularon kaj fine tra helo kaj ombro atingi unuan ŝtupon: rekono oficiala, aŭtoritateca kaj nepridubebla: la Montevidea Rezolucio.

Inter la du datoj 1905–1955 okazis gravega evento homara, unu el la plej fortaj skuoj sociaj, pri kiu ni samtempuloj eĉ ne plene konscias: la sentronigo de Eŭropo kiel decidanta faktoro en la tuthomara evoluo, la antaŭenigo de l' **Oriento** (Azio) akompanata de sama marŝo antaŭen de tutmonda potenco de l' **Okcidento** (Usono). Ĉio vidata de eŭropano iam konsiderinta *sian* starpunkton geopolitikan kiel ion absolute konstantan. La disfalo de imperioj, la forviŝo de la kolonialismo, estas nur signoj duagradaj.

Inter 1905 kaj 1955 aro da sociaj perturboj konfuzigis la popolojn kaj kondukis al katastrofoj. Ĉu do estas mirige, ke postulo tiom aŭdaca, kia estas la nia, ne povis esti centprocente realecigita? Kiom da idealismaj penadoj malaperis jam post 1914? Ni rajtas esti kontentaj **hodiaŭ**, ke spite ekstera opozicio kaj internaj krizoj en nia movado—ni **ekzistas**. En jaro 1907 komenciĝis la reform-krizo, en kiu du homoj ludis decidigan rolon. La unua, kies batalvorto estis “Ni fosu nian sulkon”, Profesoro Cart, la dua H. Hodler, kiu kreis UEA por uzi la lingvon per praktikaj servoj. La reforma movado, kiom ajn grava ĝi ŝajnis sur papero, disfalis; ĝi fariĝis lingva sektismo—la gvidvorto de la reformismo “**Neniam perfekta, ĉiam perfektigebla**”, iĝis absurda. Ne decidas la dekreto de iu aŭtoritato imagita, senpova, sed nur la uzado multmila.

La reformismo, tiom seniluziiga por multaj, devis tamen okazi. Ekzemplo instruas.

En Bulonjo 1905 unuopaj esperantistoj, sen mandato de organizaĵo, metis la “Fundamenton” de nia tradicia manifestacio, la Universala

Kongreso. En Bolonjo 1955, kunvenos krom la kongresanoj—soldatoj de la paca armeo—ankaŭ la gvidantoj de la tuta movado (senpolitika), mandatitaj de ekzistantaj organizaĵoj. Ili devas renkontiĝi por **raporti, revidi, registri** faktojn decidontaj la agadon. La Universala Kongreso de Esperanto estas laboriganta kunveno por multaj aktivuloj, ĝi estas vivanta pruvo pri ekzisto de popolo diversgenta, parolanta vivantan lingvon. En tio troviĝas la senco de nia jara manifestacio, ne forigebla, konstanta ero de nia afero. Eĉ kiam la lingvo estos ĝenerala en proksima estonto, okazos kongreso universala esperantista, sub eble alia aspekto kaj alia programo.

Dum la Bolonja Kongreso ni memoros ankaŭ pri tiuj kiuj kunvenis en Bulonjo. Speciale tiuj, kiujn la sorto favoris atingi tiun-ĉi jubileon. Malgraŭ zorga ekzameno de la “listo de kongresanoj 1905”, la subskribinto povis trovi nur kvar nomojn de partoprenintoj ankoraŭ vivantaj: nome **Generalo Bastien, Carl Barthel, Gabriel Chavet kaj Edmond Privat.**

Kiom forta konvinko, kiom da celkonscio, kiom da pacienco sumiĝis en ili (kaj aliaj, kiuj ne partoprenis la UNUAN, sed jam laboris kaj ankoraŭ nun agas)! En ili veriĝis videble versaĵo de D-ro Zamenhof komenciĝanta per

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
Ni iru la vojon celitan!*

Tion vi ĉiuj faru, karaj legantoj!

Hans Jakob

Propagandu Esperanton laŭcele!

Jen titolo sur alvoka cirkulero de ‘Komitato por laŭcela Esperanto-propagando’ fondita ĉe Aŭstria Esperantista Federacio en Vieno XV, Fünfhausgasse 16. Ĝi klopodas prepari enkondukon de Esperanto en internaciaj fakrondoj per “neoficiala metodo” tiamaniere: UEA-delegitoj kaj aliaj Esperanto-pioniroj proponu al partoprenontoj de jam difinitaj internaciaj konferencoj (laŭeble samtempe en diversaj landoj) lerni Esperanton respektive instrui ĝin, por ke almenaŭ kelkaj konferencanoj praktike apliku la lingvon ĉe la projektita internacia kunveno, elprovante ĝian utilecon unue en neoficialaj interparoloj.

Tiel, ekzemple, agas la nomita komitato: Pri “Sociala Sekureco”

dum Majo 1955 okazos konferenco de fakuloj en Stockholm. Aŭstria Esperanto-Instituto en kunlaboro kun oficistoj de Aŭstria ministerio por sociala administrado kaj kun helpo de interpretistoj ĉe la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo preparis malgrandan *Terminaron pri laboro kaj asekuro kontraŭ senlaboreco*. (Havebla kontraŭ alsendo de 1 respondkupono).

La supre menciita komitato serĉas adresojn de organizantoj de internaciaj konferencoj kaj de iliaj membroj, kaj plue esperantistajn kunlaborantojn, precipe en kongresurboj.

Interesiĝantoj skribu al la nomita komitato. Ili ricevos la cirkuleron pri la metodo de tiu laŭcela Esperanto-propagando kaj ceterajn informojn.

E. Werner,

sekretario de Aŭstria Esperanto-Instituto



40-a Universala Kongreso de Esperanto

30.VII-6.VIII, 1955, BOLONJO, Italujo

JUBILEA KONGRESO

Adreso : Kongreso de Esperanto ĉe CIT, Piazza
Nettuno 2, Bologna, Italujo

Banko : Banca di Napoli, Bologna, konto 2824

Giro : Grupo "A. Tellini", Medaglie d'Oro 3, Bologna,
N. 8/20620

N-ro 7

OFICIALA KOMUNIKO

Junio 1955

Limdato : Post la 30-a de junio (do tre baldaŭ) la L.K.K. ne plu akceptos aliĝojn al la Jubilea Kongreso. Post la 7-a de junio la Loĝiga Servo ne povos plu akcepti mendojn pri hoteloj. Tial la L.K.K. admonas samideanojn aliĝi kaj ordigi siajn kongresajn aferojn kiel eble plej baldaŭ.

Fervoja rabato : Ni bedaŭras anonci, ke la speciala fervoja rabato antaŭe promesita ne estas donita por la U.K. La kutima rabato por grupoj tamen validas sur la italaj fervojoj.

Prospektoj : La sperto montris, ke la sendo de turismaj prospektoj povas havi malagrablajn sekvojn pro doganaj formalajoj. La L.K.K. tial informas, ke ĝi ne povas akcepti respondecon pri pakaĵoj senditaj, krom se la sendintoj jam antaŭe interkonsentis pagi ĉiujn eventualajn elspezojn ligitajn kun dogano.

Gazetara Servo : La bultenoj de la Gazetara Servo estos disponeblaj nur al rajtigitaj instancoj kaj reprezentantoj, kiuj jam nun sin anoncu ĉe la L.K.K.


Deforoj dum la kongreso : Iafoje en kongreso kongresanoj bonvolis sin

proponi por helpo ĉe la deĵoroj. La L.K.K. en Bolonjo estos tre danka pro tiaj proponoj ankaŭ en la nuna kongreso. Tiajn proponojn bonvolu direkti al la kongresa oficejo. Notu bone, ke temas *nur* pri kongresanoj.

Ŝvebantaj pagoj : La kongreso ricevis kelkajn pagojn de la blanko sen ajna indiko pri la sendinto. Ni tute ne scias kiel uzi tiajn pagojn. Se vi sendas aŭ sendis pagon kaj nenion ricevis de la kongreso, bonvolu informi la L.K.K. kiel eble plej urĝe.

Statistiko (ĝis fino de aprilo) : Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 27, Belgujo 16, Brazilo 3, Britujo 87, Cipro 1, Danujo 39, Egiptujo 1, Finnuno 50, Francujo 267, Germanujo 130, Hispanujo 5, Indonezio 1, Irlando 3, Italujo 285, Izraelo 2, Japanujo 1, Jugoslavio 68, Kubo 1, Maroko 22, Nederlando 148, Norvegujo 32, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 150, Svislando 33, Urugvajo 2, Usono 13. Sumo el 31 landoj 1,399. Nemembroj de UEA 26.5% ; instruistoj 18.5% ; gejunuloj 7%.

Mason Stuttard, K.K.S.



HANS JAKOB

Jubileo de

1905-1955

DUM AŬGUSTO 1905, 14-jara junulo promenis tra la ĉefstrato de l' universitata urbo Heidelberg kaj ekhaltis ĉe granda librejo. Estis decida halto por lia tuta vivo! Lia rigardo estis altirita de nove aperinta kolekto de malgrandaj libroj, nomita "Miniatur-Bibliothek". Inter la unuaj de tiu-ĉi kelkmil-nombra biblioteko unu titolo speciale interesis nian junulon:

Die Weltsprache

La lingvo internacia

W. B. Mielck

Li akiris kaj studis la libreton, eksciinte per ĝi pri Esperanto; aldona listo de pliaj lernolibroj incitis lin, kompletigi sian scion. Jaron poste li jam korespondis kun eksterlando kaj en 1908 li jam gvidis kurson, aliĝis 1909 al UEA, fariĝis sub-delegito kaj 1912 venis Ĝenevon, vokita de H. Hodler, la ĉefa fondinto de UEA.

Tiu-ĉi junulo, kiun vi ĉiuj konas laŭnome, estas HANS JAKOB, de 1947 Estrarano de nia asocio kaj redaktoro de la revuo "*Esperanto*". Eksterordinara vivo entute dediĉita al nia afero kaj al socia justeco. Ligita per longjara amikeco al li, mi entreprenas sur la bazo de memoro, de notoj kaj de dokumentoj priskribi la vivon de Hans Jakob, kiu fariĝis unue la dekstra mano de H. Hodler, de Ed. Stettler, ambaŭ forpasintaj, kaj de Edmond Privat. La etapoj de la esperantista kariero de Hans Jakob montras laŭŝtupan evoluon:

- 1912-14 Administranto de la revuo "*Esperanto*" kaj de la tiama Esperantista librejo.
- 1914-17 Sekretario de la Centra Oficejo kaj librotenisto. Organizanto de la Dummilita servo, grandioza ideo de H. Hodler.
- 1917-18 Oficisto civila sub Aŭstria Marministerio en Cattaro-Kotor, Dalmatio.
- 1919-22 Ĝenerala sekretario, redaktoro de la Jarlibro, aranĝanto de la revuo.

- 1923-34 Direktoro, gvido de l'Administrado, redakcio teknika (Redaktoro Edmond Privat) Kompilinto de l'jarlibro, organizinto de servoj, inter ili Bibliografio, eldona, komerca, kongresa, turisma, respondkuponoj esperantistaj.
- 1935-36 Oficisto ĉe Polica kontrolo.
- 1936-42 Administranto de UEA, redaktoro, organizinto de la Esperantista helpservo kaj de la helpo al familio Zamenhof.
- 1947-55 Iniciatinto de la kunfandiĝo de UEA kun IEL, estrarano kaj redaktoro.

De 1921 ĝis 1942, Hans Jakob estis por tiel diri la motoro de UEA, salajrata laboranto. Ideriĉa kaj ege realista kiam temas pri mono, li daŭre serĉis realigi per servoj la principojn de UEA, formulitajn en 1908 de H. Hodler kaj Théophile Rousseau, Dijon. Kiu pasis dum la jaroj 1914-17 la Rue de la Bourse 10 en Ĝenevo povis vidi, ke ĉiuvespere brilis la lumo en la dua etaĝo, kie troviĝis la Centra Oficejo. Tie laboris H. Hodler kaj Hans Jakob ofte ĝis meznokto, fanatikaj idealistoj kun praktika sento. La Revuon "*Esperanto*" (kies ĉefredaktoro estis D-ro E. Privat), Hans Jakob pririĉigis per artikoloj ĉiuspecaj, pruvo de vasta scio kaj kono.

Hans Jakob, kiu finis studojn en Komerca Universitato de Mannheim kaj sekvis kursojn de la Universitato en Heidelberg, venis Ĝenevon por du jaroj, intencinte iri Amerikon. La forta personeco de H. Hodler lin restigis en tiu urbo, kies civitano li fariĝis laŭ rekomendo de eminentaj personoj ĝenevaj. Ĝenerale estimata en plej diversaj medioj, Hans Jakob estas unu el la tipaj reprezentantoj de la internacia kvartalo ĝeneva, renkontejo kosmopolita.

De 1933 Hans Jakob partoprenis aktive la politikan vivon svisan kaj

iĝis defendanto senkompromisa de la svisa "aparteco" kontraŭ la propagando naci-socialisma kaj la teorio tutgermanisma de "Heim ins Reich" t.e. enkorpiĝo de Svislando en la Trian Regnon. Li organizis la helpon al centoj da viktimoj de la Naci-teroro, (helpo al familio Zamenhof), partoprenis diversajn bonfarajn klopodojn por rifuĝintoj. En la jaro 1941, ruze ricevinte permeson vojaĝi Francujon dum okupacio germana, li vizitis la koncentrejojn de Récébédou apud Toulouse, kie vegetis Jaume Grau Casas, kataluna esp., verkisto, kaj la pli konatan Gurs, kie li povis helpi al viena samideano Bernh. Selzer. Estas neeble citi tie-ĉi la samideanojn kiuj trovis konsilon kaj helpon ĉe mia amiko.

Frue ekkoninte socian maljustecon, Hans Jakob energie klopodis por realecigi la ĝeneralan asekuron de maljuneco; en 1941 li fariĝis ŝtata oficisto en la Financa Departemento (Ministerio), centra kontrolo de la socia asekuro konata per la tri literoj AHV-AVS. La ŝtata personaro konfidis al li diversajn taskojn honoroficajn.

Menciinde estas ke dum la dua milito la germana Radio plurfoje menciis Hans Jakob kaj Georges Agricola (pseŭdonimo) pro agado kontraŭ-nacia!

Konatiĝinte kun Hans Jakob en la jaro 1913, laborinte kun li, ni fariĝis amikoj en plej bona senco de la vorto, ligataj je komunaj ideoj kaj idealo. Ke li trovu en tiuj-ĉi linioj esprimon de mia danko kaj tiun de la svisaj Esperantistoj, ne forgesantaj la multajn servojn de li plenumitajn.

Hans Kürsteiner
Honora Prezidanto de UEA

Poemoj de N. Kutzens

el MIA SPEKTRO, 1938

Fajro kaj fulgo

Nokt' ritme vibras. Voke veas tango.
Avide sango tajdas en la kor'.
Prudento mortis. Regas diktator'—
Senlima, sangsoifa vivdeziro.
Turmenta tento, preme peza spiro—
Al la ĉielo kreskas la pasi'
potenca, nevenkebla, kiel roko—
al morda kiso, al ekstaza kri' !—

Sed—venas la maten' . . . Malseke fulga
tag' senindulga viŝas ĉion for.
Kaj la ridet' loganta, la flamanta kor',
la lipoj kissoifaj—eksilentas.
Ne rok' aroga la ĉielon fendas—
en marĉon dronas kota montdeklin'.
Cindriĝis fajro, tede gutas pluvo,
kaj ftize griza glitas for la viv' . . .

Pro kio ?

Pro kio mi estu afabla
kaj kial mi penu rideti,
ĉe l' koro la manon surmeti
kaj diri, ke ĉio—agrabla ?

Se l' kor' pro indigno sangbolas,
do kial sen fin' hipokriti ?
Disŝiri la Deon kaj spiti
kaj esti malbona mi volas.

Kial mi turnu min for ?

Kial mi turnu min for
kun bigote asketa mieno,
se la Mondo ĝojhenas
kaj prenas
ĉion ?
Se la Mondo
kvazaŭ sangavida hieno
akiras, disŝiras, kaj diras sangbuŝe :
nun estas mi sata,
kontenta—
kial mi turnu min for ?

Tempo pasas

Dum juno ĉiu vojo nin invitas
kaj ĉiu foro ŝajnas sin proponi ;
sur pint' plej alta ni aspiras troni,
eĉ pens' pri cedo morde nin incitas.

Sed tempo pasas. Jaroj preterglitas.
La spitan "ni" flankŝovas graso "oni".
Ni lernas kompromisi kaj duoni,
pruntitajn pensojn servoprete citas.

Kaj iam nur, sub sprono alkohola
sin ŝiras el la cerb' ĥaose bola
kaj provas kapon levi pens' aŭdaca.

Sed vane ĝi alarmon gongi provas :
la korp' inerta sin jam plu ne movas—
ĝi estas laca, peze, morte laca . . .

elektis Arturo Foote



Tra la Mondo Esperantista

Ni petas regulajn raportojn aŭ raportetojn el ĉiuj mondpartoj por tiu ĉi rubriko, por ke ĝi prezentu tutampleksan bildon pri agado, eventoj kaj interesaĵoj el la Esperanta mondo.

ESPERANTO EN LA PALACO DE NACIOJ

Eŭropa sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo

Universala Esperanto-Asocio reprezentita en Konferenco de la Neregistaraj Organizaĵoj kiuj sin okupas por forigi la antaŭjuĝojn kaj la diskriminacion.

De la 31-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1955 Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj kiuj sin okupas por forigi la antaŭjuĝojn kaj la diskriminacion, kunvokita de la Ekonomia kaj Socia Konsilo de la Unuiĝintaj Nacioj, okazis en Ĝenevo, Svislando. Prezidis la Konferencon S-ro Vincent Auriol, iama Prezidanto de Francujo, kiu subskribis la Pet-skribon al UN pri Esperanto. La reprezentantoj de UEA estis S-ro Alfred Rehmann, Delegito, kaj S-ro Ralph Harry, Fakdelegito, en Ĝenevo. Partoprenis 97 internaciaj organizoj.

La Sekretariaro multobligis kiel oficialan dokumenton dupaĝan pri-skribon, preparitan de S-ro Harry, pri la celoj de Esperanto kaj ties rolo rilate al la tri aspektoj de diskriminacio bazita sur lingva diverseco malebligo de la ĝuo de homaj rajtoj, diskriminacio kontraŭ la uzantoj de la internacia lingvo mem, kaj la diskriminacio kontraŭ la malgrandaj lingvoj en internaciaj konferencoj kaj internaciaj organizaĵoj.

Dum la dua kunveno de la Konferenco, la 31-an de marto post-tagmeze, S-ro Rehmann alparolis la Konferencon. La ĉeestantoj montris grandan intereson kiam la Prezidanto

anoncis la reprezentanton de la Universala Esperanto-Asocio. S-ro Rehmann, kiu parolis franclingve, priparolis la samajn temojn kiujn traktis la dokumento. Aldone li informis la Konferencon pri la traduko de la Deklaracio de Homaj Rajtoj en Esperanton kaj ĝia dissendado. Li legis esperante la tekston de artikolo 2 (1) de la Deklaracio. Fine li invitis ĉiujn organizaĵojn favorigi la lernadon de Esperanto inter siaj anoj kaj uzi Esperanton en siaj kunvenoj. Plena raporto pri la alparolado de S-ro Rehmann estis en la protokolo kaj la tuta teksto estis disdonita al la reprezentantoj kaj al la ĵurnalistoj. La plej granda parto de la ĉeestantoj sciis nenion aŭ preskaŭ nenion pri Esperanto antaŭ la Konferenco. Poste du cent personoj, inter kiuj multaj eminentuloj, scias, ke la Universala Esperanto-Asocio estas vigla kaj vivanta organizaĵo. Al kelkaj la delegitoj de UEA povis paroli dum la kunvenoj kaj festetoj pri la eblecoj de la internacia lingvo por ilia laboro. Al multaj ili povis komprenigi la reton de delegitoj de UEA. Al aliaj ili povis doni la tekston de la rezolucio de UNESKO. Multaj mencios en siaj raportoj al la

Neregistaraj Organizaĵoj, kiujn ili reprezentas, la fakton, ke ĉeestis en la Konferenco delegitoj de UEA.

Diskrimin(aci)o = Maljusta diferencigo.

Argentino

Vigla gazetservo. La Argentina Esperanto-Ligo sukcesis organizi reton de agentoj tra la lando, kiuj rekte kontaktas kun la redaktoroj. Oni eldonas monatan informilon mimeografitan, kiu estas sendata al la agentejoj de ĉiuj urboj. Kie ne ekzistas agento oni sendas la informilon rekte al la ĵurnaloj. Okaze de la Uneska venko la Ligo eldonis eksterordinaran n-ro-n, kiu estis sendita al 500 publikaĵoj kaj radioj. Per abono al gazeteltonda agentejo oni ricevas la plimulton de la aperintaj informoj. La rezultoj estas jam imponaj kaj ampleksas ankaŭ radio-prelegojn kaj ekspoziciojn. Dum kreskas la kampanjo, kreskas ankaŭ la publika intereso pri Esperanto. Oni antaŭvidas pli fortajn atingojn.

Britujo

Ondetoj skuis la surfacon. Ĉe la kongreso de B.E.A. dum pasko en Swanwick oni malakceptis per granda plimulto proponon de malkonfido al la nova prezidanto, S-ro A. C. Oliver. La kongreso okazis en agrabla medio; oni koncertis, balis kaj ekskursis. Pri la laboroj, kredeble faritaj en la komitata kunsido, ni ne ricevis detalojn.

Danlando

La vojo estas libera. La landa gazeto *Dansk Vandrelaug* presis artikolon "UNESKO donas verdan

lumsignalon al Esperanto". Je la fino oni citas la deklaron de Prof. Collinson: "Esperanto kombinas la praktikan facilecon de la angla, la elegantecon de la franca, la ege emocian econ de la germana kaj la melodian belecon de la itala lingvoj."

Norvegujo

Ĝus aperis la jarraporto de Norvega Esperantista Ligo pri la jaro 1954. El tiu raporto jenaj informoj pri la atingiĝoj de la Ligo estas menciindaj:

Je la fino de 1954 N.E.L. havis 29 lokajn grupojn kaj sume 849 membrojn. N.E.L. aranĝis denove konkurson inter la grupoj, laŭ modelo de la internacia konkurso de UEA; la unuan lokon atingis la grupo en Kristiansund N., kiu atingis 266,7% de sia kvoto.

Okazis en la lando 36 kursoj kun 266 partoprenantoj. En la grupoj laboris 24 studrondoj kun 190 membroj. La leterkurso ekhavis 104 novajn lernantojn. La nova gazeta kurso aperis en 5 gazetoj.

La Gazetara Servo dissendis 27 artikolojn kaj artikoletojn kun novaĵoj pri Esperanto al ĉiuj norvegaj gazetoj (proks. 200), kaj registris 1,143 aperojn en 142 gazetoj. 3a eldono de la propagandbroŝuro "Esperanto la internacia lingvo" estis presata en 10.000 ekzempleroj.

Pollando

Sinjoro Tadeo reeldonota !

"La Esperanta poezio . . . surprenas la formon de gracia, svelta ponto, kies fino perdiĝas en la senfinajn, mult-promesajn forojn de l' Estonto, kaj kiu firme ripozas sur la tri kolosaj, potencaj pilastroj: ZAMENHOF, GRABOWSKI, KALOCSAY."

Tiel skribis L. Totsche en la libro *De Paĝo al Paĝo*. Nun ni ekscias kun ĝojo, ke la Plenumkomitato de la *Jubilea Mickiewicz-Jaro en 1955*, laŭ propono de Asocio de Esperantistoj en Pollando, decidis reeldoni la ĉefverkon de Antoni Grabowski: la nacia vers-epopeon *Sinjoro Tadeo*. La Komitato decidis eldoni ankaŭ en Esperanto ĉ. 100-paĝan verkon de nuntempa pola verkisto kaj poeto Mieczysław Jastrun pri Mickiewicz.

La decido de la Komitato estas des pli grava, ke ĝia prezidanto estas la Prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro (funkcio egala al tiu de ŝtatprezidanto) kaj ke en la Komitaton eniris ministroj k.a. gravuloj. Efektivigo de tiu ĉi decido, antaŭ ĉio de *Sinjoro Tadeo*, estas komisiita al ŝtata entrepreno, kiu antaŭe volas enketi la eventualan vendeblecon. Tial ĝi turnas sin al la Esperantaj organizaĵoj, vendejoj ktp pri la antaŭa, nedevigamendo. Malgraŭ la fakto, ke *Sinjoro Tadeo* estos bindita kaj enhavos aldonitajn ilustraĵojn, ĉiu ekzemplero kostos tre malmulte kaj la revendistoj profitos de la kutima rabato. La eldonejo projektas reeldonon de la fama verko de Bolesław Prus *Faraono* kaj eventuale aliaj verkoj el pola literaturo en Esperanto. Oni skribu al la Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa, Marszałkowska nr. 81/82.

Se ni ne eraras pri la nuna etoso de la movado, kiel ĝin indikas ankaŭ la letero de L. Govier sur p. 196, la esperantistoj scios respondi entuziasme kaj multnombre al la supra grava anonco.—*Red.*

Varsovia Festivalo dungis Esperantan tradukiston

La ĉisupran novaĵon ni havas el la Tutmonda Festivalo de Junularoj kaj Studentoj, 30 Julio–14 Aŭgusto (vidu

en aprila n-ro p. 10, sed notu la novan adreson: Organiza Komitato de la Va Tutmonda Festivalo de Junularoj kaj Studentoj, Warszawa, str. Grójecka). La nombro de alvenintaj korespondoj en Esperanto ankoraŭ ne estas granda. Estas necese, ke leteroj alvenu torente, ĉar tre grave kaj tre urĝe estas, ke ni helpu nun al la Esperanta movado en Polujo, lando de la Majstro.

Pietato al Zamenhof

Varsovio. Je la 14-a de Aprilo, datreveno de la morto de Zamenhof, parolis Edmund Fethke “Pri Zamenhof kaj liaj idealoj”. Je la 17-a de Aprilo kolektiĝis ĉe la tombo de D-ro Zamenhof varsoviaj esperantistoj. Oni surmetis belan florkronon kun surskribo “al kara kreinto de Esperanto—Asocio de Esperantistoj en Pollando”. Impresajn paroladojn faris Prez. de pola movado Edward Bugajski kaj S-no Jakub Garbar. Poste en nomo de sveda esperantistaro honoris la Majstron David Holmkvist el Sundsvaal. La soleno finiĝis per kanto de *La Espero*.

Brno. La Esperanta Klubo en Brno dediĉis al la mortodato de la Majstro muzikan programon kun brila konstelacio de komponistoj: Beethoven, Schubert, Smetana, Dvořák, Ĉajkovski, Mascagni k.a., kaj same unuaranga vico de tradukantoj (Pumpr, Kořínek, Hromada, Lukáš) kaj de gekantistoj, sub gvidado de Vilibald Scheiber, kiu ankaŭ donis la pianoakompanon. Vere pompa kaj inda honorado.

Samtempe atingis nin la programo de la Brna Klubo por Majo–Aŭgusto. Ĝi vekas admiron kaj la sopiron traĝui la elitajn programojn, kaj ni scivolas,

BAZA LABOR—PROGRAMO DE UEA

Estrarano D-ro Ivo Lapenna prezentis al la Estraro koncizan planon pri la ĉefaj aktivecoj de UEA en la sekvantaj jaroj rezulte de la decidoj de UNESKO. Dum siaj kunsidoj de la 19-20 de Marto la Estraro diskutis la planon kaj decidis proponi ĝin al la Komitato por diskuto kaj decido dum la Kongreso en Bologna kiel Bazan Labor-Programon de UEA. Por ke la tuta membraro havu la eblecon informiĝi pri ĝi kaj povu eventuale fari pliajn sugestojn, la Estraro plue decidis publikigi ĝin en la oficiala organo de la Asocio. Ĉiujn eventualajn sugestojn koncerne la Bazan Programon oni sendu al la Prezidanto de UEA S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedlando.

I. Enkondukaj vortoj :

La decidoj de UNESKO signifas unuarangan rekonon de ĉiuj niaj atingoj. **Ili markas komenciĝon de esence nova etapo : tiu de la oficiala rekono.** Por vaste utiligi tiun akiritan pozicion estas necese plani ĉiujn aktivecojn de la Asocio por la sekvantaj jaroj ekstere kaj interne. Ĉiu limigo al nur unu aŭ kelkaj branĉoj povus, eble, doni rezultojn en la elektitaj sferoj, sed ne havus grandan valoron por la tuto, nome por la ĝenerala, tre vasta progresigo de la Internacia Lingvo. En la nuna

situacio de la mondo, precipe konsiderante la staton de spiritoj postulantaj ĉiam pli kaj pli internacian kompreniĝon kaj amikecon por eviti katastrofon de la homaro, post la agnosko de UNESKO pri la valoroj atingitaj per Esperanto, la Asocio kaj la Movado ĝenerale tute certe povas atingi konsiderindajn rezultojn, se ĝi agos laŭplane, metode kaj konkorde. Jen la ĉefaj taskoj, kiuj altrudiĝas :

II. Eksteraj taskoj :

(1) **UNESKO kaj UN.** Plifortigi la rilatojn precipe per efika kunlaboro pri punktoj komunaj laŭ speciala plano.

(2) **Eŭropa Konsilantaro.** Havigo de konsulta pozicio ; efektiva kunlaboro por solvo de la lingva problemo en Eŭropo ; ĝemeligado de urboj per Esperanto ; internaciaj kursoj pri eŭropaj problemoj sub aŭspicioj de E.K. ; laŭ ebleco eksperimentaj kursoj en diverslandaj lernejoj kun la fina celo enkonduko de E. en la lernejojn.

(3) **Internacia konvencio.** Paralele kun la klopodoj sub (2) fari similan klopodon en monda kadro por subskribo de Internacia Konvencio pri enkonduko de E. en la lernejojn. Tiucele iniciati diplomatajn kontaktojn inter la landoj plej maturaj por tia Konvencio (Nederlando, Norvegujo, Jugoslavio, Japanujo, Aŭstrio, Brazilo).

(4) **Azio kaj Afriko.** Vasta informa laboro sur tiuj du kontinentoj (dujara vojaĝo de komitatano Sekelj ; artikoloj kaj kursoj fare de la ekspedicio Sekelj ; fondo de

ĉu iu ajn klubo en la mondo disponas je tiom da talento kaj klero.

Prelegvojaĝo de Prof. Lapenna

En fino de Marto kaj komenco de Aprilo Prof. Lapenna faris paroladojn en Parizo, Roterdamo kaj Amsterdamo, kun lumbildoj kaj magnetofona bendo, pri la Uneska dramo en Montevideo. Entute ĉeestis la 3 kunvenojn 800 personoj. En Roterdamo okazis ankaŭ gazetara konferenco sekvita de longaj raportoj sub grandaj titoloj en ĉiuj urbaj gazetoj.

societoj kaj asocioj en ĉiuj landoj, vizitotaj de la ekspedicio Sekelj ; livero de artikoloj al gazetoj kaj revuoj de tiuj landoj fare de la Informa Fakoj ; bulteno de la IGS en angla kaj franca lingvo por la gazetoj kaj revuoj de tiuj landoj).

(5) **Aliaj landoj.** Plifortigo de la informa laboro en ĉiuj landoj, sed tute speciale en la landoj de Suda Ameriko, en kiuj praktike nia Movado ne ekzistas. Tiucele fortikigi la jam ekzistantajn landajn asociojn kaj fondi novajn kun la helpo de la jam ekzistantaj. Okazigo de unu el la sekvantaj UK en Suda Ameriko kaj de alia, depende de la progreso en Azio, en unu el la Aziaj landoj.

(6) **Edukado, scienco kaj kulturo.** Nepre plifortigi la poziciojn de Esperanto en tiuj medioj en ĉiuj landoj. Tiucele specialan atenton dediĉi al informa laboro inter universitataj profesoroj kaj sciencistoj, geinstruistaj asocioj, studentoj. Por helpi la celon sub (4) organizi informan laboron, disdonadon de lernolibroj kaj okazigon de kursoj speciale inter la studentoj el landoj de Azio kaj Afriko, kiuj troviĝas en la eŭropaj universitatoj, precipe Parizo, Londono, Amsterdamo.

(7) **Fakaj kongresoj kaj konferencoj.** Iom post iom enkonduki Esperanton en la fakajn internaciajn kongresojn kaj konferencojn. Atingi tiun celon per (a) atentigado pri la valoro de Esperanto, (b) persona partopreno de esperantistoj-fakuloj en la kongresoj kaj konferencoj.

(8) **Leksikonoj kaj enciklopedioj.** Prizorgi taŭgajn artikolojn de diversaj longecoj pri E., Zamenhof kaj la problemoj de komuna lingvo ĝenerale por ĉiuj leksikonoj kaj enciklopedioj.

III. Internaj taskoj :

(1) **UEA.** (a) Aligi al la Asocio ĉiujn ekzistantajn landajn kaj fakajn asociojn ; (b) iniciati kaj helpi la organizon de novaj landaj kaj fakaj asocioj ; (c) ligi al la Asocio la milojn kaj milojn da personoj, kiuj apogas la celojn de la Esperanto-Movado, plej taŭge en formo de apogantoj ; (d) grave altigi la nombron de individuaj membroj per speciala tiucela kampanjo en ĉiuj landoj de la mondo ; (e) havigi al la Asocio dignan domon en Londono (kun biblioteko, konferencejo) kaj centrigi en ĝi ĉiujn

branĉojn de la Asocio ; (f) aŭ fakte funkciigi la Ĝenevan Oficejon (tre dezirinde) aŭ nepre trovi iun alian solvon ; (g) kun la tempo funkciigi laŭ ebleco specialan informan oficejon por Azio en unu el la aziaj landoj ; (h) modernigo de la CO per nuntempaj oficejaj instrumentoj (diktafono ktp.) kaj precipe per malgranda moderna presejo por publikigo de diversaj propagandiloj kaj bultenoj ; (i) nepre konservi CED kiel specialan sciencajn institucion de la Movado kaj ne miksi ĝin kun la aliaj aktivecoj, speciale ne kun la branĉo informado.

(2) **Informado.** (a) Larĝigo de la Informa Fakoj surbaze de la akiritaj spertoj ; (b) eldonado de la bulteno de la IGS plue en Esperanto, sed krome ankaŭ en la angla kaj franca lingvoj por sendo rekte al la gazetoj kaj revuoj de landoj, en kiuj ne ekzistas landaj informaj fakoj ; (c) utiligo de materialoj de la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto por okazigo de similaj ekspozicioj en diversaj landoj (ellabori detalan planon, tiel ke la ekspozicia materialo estu senĉese utiligata kaj neniam, krom dum la transporto, troviĝu en kestoj) ; (d) eldono de specialaj flugfolioj kaj prospektoj en pluraj lingvoj, precipe por la neesperantistaj kongresoj ; (e) traduko kaj publikigo en naciaj lingvoj de artikoloj, studoj kaj verkoj havantaj informan karakteron ; (f) konstanta rubriko en *Heroldo* aŭ alia gazeto sub la titolo "Defendo de la lingvo Esperanto" ; (g) konsiloj al la landaj informaj fakoj pri plibonigo de informado kaj fondo de novaj informaj fakoj ; (h) plilarĝigo de laboro de la informaj fakoj al organizado de bonaj ekspozicioj, publikaj prelegoj, prelegoj en lernejoj, prelegoj per radio kaj aliaj metodoj de informado laŭ specialaj instrukcioj ; (i) konstanta, ĉiujara kontrolado pri la informa laboro en mondaj kadroj koncerne la kvanton kaj kvaliton ; (j) regulaj kunvenoj de la reprezentantoj de la landaj informaj fakoj dum la U.K. por diskuti la pliajn aktivecojn.

(3) **Kursoj.** Multe plibonigi la nivelon de la lingvo-instruado per (a) organizo de internaciaj kursoj por la kursgvidantoj ; (b) internaciaj diplomoj por Esperanto-instruistoj, aŭ speciala branĉo en la kadro de ILEI ; (d) kontrolo de lernolibroj kaj rigora kritiko pri lernolibroj kaj vortaroj, kiuj deformas la lingvon ; (e) verkado de lernolibroj, aŭ instigado al tia verkado, por la popoloj de Azio kaj Afriko ; (f) apogo al

internaciaj kursoj aranĝataj de D-ino Peter Ruetschi kaj konsiderinda larĝigo de tiuj kursoj al Aziaj popoloj; (g) specialaj, altnivelaj kursoj en instruistaj lernejoj, seminarioj, asocioj; (h) kurso en lernejoj kaj internacia kunligo de la geinstruistoj kaj gelernantoj (nepre prizorgi la ligojn al la Movado de la lernantoj, kiuj finas tiujn kursojn, ĉar la ĝisnunaj spertoj tiurilate montras minimumajn rezultojn); (i) kontrolo de la progreso sur la kampo de instruado per statistikoj, enketoj kaj aliaj metodoj, kaj konstanta interkonsiliĝo por plua progresigo; (j) por atingi de la supraj celoj firme kunlabori kun la Akademio kaj Internacia Esperanto-Instituto.

(4) **Kulturaj problemoj.** (a) ĝenerala altigo de la kultura nivelo de la grupoj kaj societoj (interŝanĝo de prelegoj utiligante por tiu celo parte ankaŭ elektromagnetajn bendojn, teatrajn trupojn, vivajn gazetojn, lumbildojn kaj filmojn, prelegvojaĝojn); (b) klopodoj rilate la enhavan plibonigon de la tuta Esperanto-gazetaro; (c) kreo de literatura revuo aŭ helpo al privata iniciato (senpaga reklamado kaj morala helpo) rilate la fondon kaj evoluon de tia revuo; (d) fondo, en kunlaboro kun ILEI, de pedagogia revuo aŭ helpo al ILEI por fondi tian revuon; (e) larĝigo kaj plioftigo de Scienca Revuo en kunlaboro kun ISAE; (f) laŭ ebleco fondo de sociologia revuo aŭ utiligo de la Scienca Revuo, post ĝia pligrandigo kaj plioftigo, por publikigo de sociologiaj studoj; (g) multe pli granda helpo al ĉiuj fakaj asocioj, sed speciale al la geinstruista, scienca, ĵurnalista, fervojista, medicina kaj al sociologia komisiono (laŭ ebleco atingi, ke la fakaj asocioj aliĝu al UEA laŭ la kondiĉoj de la landaj asocioj, tiel ke ili estu reprezentitaj en la Komitato); (h) instigo al fondo de novaj fakaj asocioj; (i) konsiderinda larĝigo de la reto da fakaj delegitoj, precipe por la plej gravaj fakoj rilatantoj al ĉiuj branĉoj de edukado, scienco kaj kulturo; (j) instigo al fondo de novaj grupoj en lokoj, kie ili ankoraŭ ne ekzistas, aŭ en grandaj urboj, en kiuj ekzistas nur unu grupo (la spertoj montras, ke eĉ en grandegaj urboj niaj grupoj ne povas transpasi la nombron de 300 membroj, kio necesigas la fondon, en tiaj urboj, de novaj grupoj ĉu laŭ vidpunkto teritoria, ĉu laŭ vidpunkto profesia aŭ faka (studentaj, laboristaj, intelektulaj aŭ similaj grupoj).

(5) **Financaj demandoj.** Por realigi la planon oni devas aŭ konsiderinde plialtigi

la stabon de la CO per specialistoj kun adekvataj salajroj, aŭ bazi ĉiujn ĉi aktivecojn, krom la pure administra laboro, sur libervola agado de kompetentaj kaj spertaj personoj. Pro manko de financaj rimedoj la unua ebleco forfalas. Restas la dua ebleco tiel, ke la Komitato, post konsidero de ĉiuj aspektoj, havu la rajton doni almenaŭ plej modestajn kompensojn por tiuj laboroj, kiuj postulas specialajn kondiĉojn kaj konsiderindan tempoperdon. Antaŭkondiĉo por tio estas la akcepto de la nova Statuto, kiu prezentas solidan bazon kaj sufiĉe larĝan kadron por realigi la planon. Se tio okazos, la financaj rimedoj devos esti dispartigitaj jene:

(a) La kotizoj devas pagi ĉiujn regulajn elspezojn por la administrado de la C.O., de la Serva Oficejo, de la gazeto kaj Jarlibro.

(b) Por ĉiuj aliaj aktivecoj oni devas utiligi la licencpagojn de la U.K., la eventualajn purajn profitojn (parto apartenanta al UEA) de la U.K.; ĉiujn pagojn de la apogantoj; ĉiujn donacojn kaj heredaĵojn, kiuj estas difinitaj al iu el tiuj specialaj celoj aŭ al ĉiuj.

IV. Konkludo:

Nur la paralela agado en ĉiuj supre menciitaj direktoj certigas la sukceson. Tiu ĉi plano prezentas nur bazan skizon por la estonta agado de la Asocio. Certe, dum la realigo de la plano ekestos novaj demandoj, kiujn oni devos adekvate solvi.

Internaciaj FERIAJ Esp-Kursoj en **Helsingør**, Danlando,

okazos 17-24 de julio, 1955

Kursoj: Daŭriga, konversacia, preparo por Cseh-metodaj instruistoj—kaj por infanoj.

Prospekto havebla ĉe:

L. Friis,

Ingemannsvej 9,

Aabyhøj, Danlando.

Belarta Konkurso 1954 : Prozo Originala

G. C. Jervis

Fraŭlina pudoro similas al oro

F-INO DOTITA SENGARNA impetis trans la straton, mirakle evitante la trafikon. Kamiona ŝoforo samtempe sakris kaj rapide bremsis, sed la insulto svenis sur lia lango. Li kun ŝato rigardis la gracian figuron de la pekintino, jen sveltan, jen rondan, kaj ĉiam ĝustaloke, ĝis la blondaj bukloj, la nekredeble blondaj bukloj, fordancis en pordon. Poste, responde al senpacienca signalo de aŭto malantaŭe, li premis per piedo kaj manipulis per mano. La kamiono muĝis, tremegis, kaj ruliĝis for, portante kun si direktiston kun dolĉe melankolia koro. La aluminiakaj kaseroloj en la ŝarĝujo klakadis kaj knaris funebro al efemera revo.

Malantaŭ la sceneja pordo de la Teatro Gaja-Muelilo, la pordisto levis sian grizan kapon kaj rigardis tra la ĝiceto, dum la blondaj bukloj preterfulmis. Li senemocie rearanĝis la kurban pipon inter la dentoj, kaj lia spirito denove trempis sin en gazeta sportartikolo.

Du longaj kalkanumoj kastanjetis sur la sentapiŝa ŝtono de la ŝtuparo per muziko klare kolera. F-ino Sengarna spiralis ĉiam supren kaj ĉiam maldekstren. Ŝi taktakis laŭ koridoro. Atinginte pordon, ŝi per unu movo ĝin frapetis kaj malfermis, kaj sin enĵetis.

“Hola, Za-za !” ŝi eligis en okupita tono.

Roza Lipopar ne ĉesis kritike ekzameni en la spegulo la efekton de la ŝminko, kiun ŝi ĵus aplikis al la vizaĝo.

“Hola, Doti !” ŝi bonhumoris, “Ĉu via amato vin ĵetis ?”

“Kial vi demandas ?”

“Via mieno ne ŝajnas tre somera.”

“Ha ! Mi ne dubas. Hu, la fimensa, la ruza, nazoflua bubaĉo—”

“Ja temas pri via amato.”

“Amato ? Ne ! Ami tiun rateton ? Mi parolas pri la filo ĉe mia loĝejo.”

Jam preta en karnavaleca formo de la kostumo de usona bovistino, F-ino Lipopar iom premis sin al la muro de la ĉambreto. En la malvasta spaco tiel disponigita, ŝia kamaradino komencis demeti la palton, la jakon, la jupon, la bluzon . . .

“Nu, rakontu, Doni, se tio malŝarĝos al vi la koron.”

“Nu,” komencis F-ino Sengarna, “vi scias ja, ke ĉi-semajne mi loĝas ĉe bakista familio, du stratojn for. Mi kredis min feliĉa, ke mi trovis tian komfortan lokon. Vi memoras la urbaĉon, kie ni ludis lastan semajnon. Nur kun peno mi trovis loĝejon, kiu ne fiodoris netolereble. Mi—”

F-ino Lipopar provis kelkajn dancpaŝojn, kaj la metalaj garnaĵoj de ŝiaj dancŝuoj klakis sur la nuda planko.

“Ne forgesu, ke oni vokos min post nelonge. Oni jam vokis la komencon de la uverturo.”

“Nu,” koncizigis F-ino Sengarna, “la bakista familio estas tri : patro bakisto, panjo, kaj filo. La filo havas eble dek ses jarojn. Liaj okuloj per si mem naŭzas ; porkaj, avidaj okuletoj —kaj aknoj ! Hu ! Oni ne povus meti groŝon sur lia vizaĝo sen kovri aknon. Malĉastaj pensoj tiel svarmas en lia stulta kapo, ke ili pustuliĝas sur lia vizaĝo.

“Nu, mia ĉambro estas sufiĉe komforta trueto, du etaĝojn super la

strato. Amiketo bakistfilo havas la alian ĉambron sur la sama etaĝo. Mi rimarkis, sed ne multe atentis la fakton, ke parto de la muro inter la du ĉambroj estas simpla ligna vando el tabuloj.

“Hodiaŭ la bakista familio kaj mi manĝis en hejmeca rondo malantaŭ la panbutiko. Tuj poste mi devis jam forrapidi ĉi tien, sed kiam mi min levis de la tablo, mia kruro ektuŝis ion malglatan kaj—zit ! tuj fulmis maltrikaĵo en mia bona nilona ŝtrumpo.”

F-ino Lipopar murmuris kondolence.

“Nu ja,” filozofis F-ino Sengarna, “tiaj malfeliĉoj nin trafas ĉiujn. Sed nepre necesis, ke mi tuj ŝanĝu la ŝtrumpojn kaj forkuru al la teatro. Do mi pelis min supren al mia ĉambro, kaj elserĉis alian paron. Dum mi serĉis, mi aŭdis fileton-bakiston veni supren kaj iri en la propran ĉambron. Nu ; tion li ja rajtis en la propra hejmo. Sed kiam mi sidiĝis por ŝanĝi la ŝtrumpojn, trafis min stranga maltrankvilo. Mi ne aŭdis la bakistfilon moviĝi en sia ĉambro, eĉ tra la maldika vanko. Mi rigardis la vandon kaj rimarkis ion, kion mi ĝis tiam ne rimarkis. Mi proksimiĝis kaj—jes ! Ĝi estis truo ! Tiu feĉa, fetora fibuboboris truon por min observi en mia dormĉambro !

“Jes ; kaj eĉ tiam li min observis. Kiam mi proksimiĝis, mi aŭdis lin fortiri sin kaj karamboli kun io. Efektive, bruis, kvazaŭ li paŝus en noktovazon. Se jes, mi esperas, ke ĝi estis plena.”

“Kaj kion vi faris ?”

“Faris ? Mi tuj ŝtopis la truon per korko el mia tus-medikamento.”

“Sed ĉu vi ne plendis ?”

“Al kiu plendi ? Mi ŝanĝis la ŝtrumpojn kaj malsupren iris. Paĉjo kaj panjo vendis panojn tre diligente

en la butiko, kaj cetere mi devis kuri ĉi tien plej rapide. Fileto restis en sia ĉambro. Mi volis enkuri kaj mueli lian trudan nazaĉon sur la litkadro, sed se mi estus tion farinta, oni supozeble akuzus, ke mi provis atencilian ĉaston. Fi, la kruda, kanajla kaĉuleto !

“Sed nur pensu, Za-za. Mi dormis tie jam kvar noktojn. De kiam li disponas pri tiu infera truo ? Eble li eĉ kvarfoje vidis min pretigi min por la lito. Hu ! kiel honte ! La simpla penso naŭzas min. Tiuj porkaj okuletoj, tiu malseka buŝo—hu !”

F-ino Sengarna skuiĝis de abomeno.

Sia kamaradino rigardis flanken kun stranga vizaĝmieno.

“Sed, Doti, mia kara—”

Bum-bum-bum ! Bum-bum-bum ! Vigla frapado ĉe la pordo ŝin interrompis. Monotona voĉo kriis: “F’lino Lip’ar ! Nepra voko ! Nepra voko ! Venu tuj, m’petas.”

“Ĝis re, kara Doti ! Ne tro ĉagreniĝu !”

Post la foriro de sia kamaradino, F-ino Sengarna kompletigis sian pretigon. Ŝminkite, en longa blua robo, ŝi staris antaŭ la spegulo kaj zorge sidigis sur sia kapo fantazie larĝan hispanan ĉapelon.

La sama kuriero revenis, frapis, kaj raŭkis alvokon. F-ino Sengarna ĵetis lastan ekrigardon al la spegulo kaj sekvis lin. Ŝi spiralis ĉiam malsupren kaj ĉiam dekstren. Ŝiaj molaj pantofloj faris nenian bruon sur la ŝtonaj ŝtupoj.

La vasta scenejo kuŝis en duona mallumo. Granda tolo du metrojn post la portalo kaŝis la publikon. Tra ĝi la knara voĉo de komikisto estis aŭdebla, kaj foje-foje alruliĝis ridego el pli ol mil gorĝoj.

Sur la sceneja planko, dancistinoj staris pretaj en kostumo de hispanaj

kavaliroj kaj sinjorinoj. Malantaŭ ili montis ŝtuparoforma podio garnita per hispanecaj bagateloj. Jen kaj jen sur la ŝtupoj jam staris belulinoj en hispana ŝalo kaj mantilo.

F-ino Sengarna ascendis preter ilin ĝis la plej supra plato de la podio. Tie ŝi staris. Eksonis la orkestro, la komikisto kantis strofon de kanzono, kaj sekvis tondra aplaŭdado. F-ino Sengarna forskuis siajn pantoflojn kaj kaŝis ilin sur oportuna breto malantaŭ la podio. Glitiginte la bluan robon for de siaj ŝultroj, ŝi faligis ĝin sur la sama kaŝita breto.

La aplaŭdoj ĉesis. La scenejo tute mallumiĝis. F-ino Sengarna rigidiĝis en pozo. La tolo antaŭ ŝi facile leviĝis en la ombran hisejon. Hispanaj ritmoj ektamburiĝis el la orkestro.

Kaj—venis la lumo. El supre, el flanke, el fokus-lanternoj en la aŭditorio, lumo, klara kaj mola,

reliefigis la buntajn figurojn de la dancistinoj, kies piedoj jam vigle plankofrapadis, kies kastanjetoj jam stakate klakadis. Ĝi falis sur la ŝtuparoforman konstruon en la fono; sur la hispanajn ŝalojn de la senmovaj figuroj starantaj dise sur la ŝtupoj.

Ĝi falis karese sur la belan, rozan figuron, kiu statuis plej supre sub la grandega ĉapelo. Pompis la rondaj mamoj, logis la glataj ŝultroj, la kava umbiliko, kaj la ĉarmaj konturoj de la longaj gamboj. Centoj da viraj okuloj boris el la mallumo; de mondsagaj kazinuloj, de senspertaj knaboj, kiuj vidis nudulinon antaŭe nur en sekreta revo.

Tie supre, tra la menso de F-ino Sengarna kuris subita bildo de avida okulo malantaŭ truo en ligna vando. Ŝi sulketigis la frunton, kaj iom de la sukero malaperis el ŝia rideto.

La supra verko gajnis la duan premion.

Nia Kovrilbildo. Ni atentigas pri la *Internacia Semajno*, okazonta en la Kulturdomo la 15–23.7, kaj pri la *Internacia Renkontiĝo Kultura kaj Turisma*, okazonta la 24.7–6.8.

Difinoj

Malklerulo. Iu, kiu ne scias tion, kion mi mem ĵus lernis.

Tedulo. Iu, kiu paroladas pri si mem, dum mi volas paroladi pri mi mem.

Neologismo. 1. Vorto, kiun mi mem neniam bezonis uzi. 2. Vorto ne troviĝanta en mia ŝatata lernolibro.

Necesa neologismo. 1. Nova vorto, kiun mi mem okaze uzis. 2. Nova vorto tirita el mia nacia lingvo. 3. Nova vorto finiĝanta per -acio.

Teknika termino. Neologismo kun aŭtomata pasporto.

Esperanto. La Internacia Lingvo, dank' al kiu mi volonte legas verkojn tradukitajn el mia nacilingva literaturo.

Esperantisto. Nekompetenta juĝanto pri Esperanto, ĉar li scias ĝin.

Neesperantisto. Kompetenta juĝanto pri Esperanto, ĉar li ne scias ĝin.

Sukcesplena. Nepra karakterizo de ĉiu kongreso kaj kongreseto.

Logika sekvo. Tri famaj drink-emuloj decidis logike elserĉadi pri la kaŭzo de la ebrieco.

Ununokte, drinkis brandon kaj akvon. Ili ebriiĝis.

Alianokte, drinkis viskion kaj akvon. Ankaŭ ebriiĝis.

Trianokte, drinkis konjakon kaj akvon. Same ebriiĝis. . .

De tiam, ili ne trinkis plu akvon.

La supran anekdoton, kiel ankaŭ tiun sur p. 200 sendis S-ro E. Calvet el Tarragona.

Statistika promeno tra Jarlibro 1955


UNU malgranda, belaspekta, poŝformata bildo de la praktika uzebleco de la internacia lingvo estas nia jarlibro, kiu ĉiujare ĝojigas nin per sia alveno en la unua kvaronjaro. Ĝi prezentas dokumenton, kiu montras al ni, kiom ni ĝis nun akiris en unu parto (tre grava) de la praktika uzo de Esperanto, kaj kio estas ankoraŭ farota. Ĉiu statistika analizo komenciĝas per komparo. Antaŭ mi kuŝas Jarlibroj 1954 kaj 1955. Jarlibroj montras al ni en kiom da landoj Esperanto vivas kiel servopreta en la kadro de la delegita reto. La komparo ne montras kontentigan rezulton. **En la nova Jarlibro aperis nur du novaj nomoj, du novaj ŝtatoj, Libio kaj Tunizio, kiuj malfermis sian pordon al la tutmonda esperantistaro. Sed — kvar ŝtatoj menciitaj en la Jarlibro 1955 malaperis (Gabon, Kameruno, Liĥtenŝtejno kaj Peruo).** Ne necesas malesperi pro tio, sed konscii, ke ankoraŭ granda laboro atendas nin, ke ekzistas multmilionaj ŝtatoj Hindujo, Pakistano, Ĉinujo, kaj aliaj, kie eĉ ne unu persono deklaris sin preta kontakti kun aliaj pere de la Internacia Lingvo. Ni ne dormu sur la laŭroj de Montevideo ; ni konsciu, ke Esperanto konkeris la terenon ĉefe en Eŭropo kaj ke ekster ĝi ni devas sieĝi la kastelojn precipe de afrika kaj azia ignoro, nescio kaj indiferento.*

La delegita kaj fakdelegita funkcioj estas plej utilaj por la movado. Sed dum la delegita funkcio estas laŭ la

signifo pli sentimentale-turisma (fari restadon en fremda lando agrabla), la fakdelegita estas pli signifa kaj prezentas esencan kernon de la tasko, pro kiu Esperanto ekzistas : servi al interŝanĝo kaj konigo de kulturaj, sciencaj kaj aliaj akiraĵoj inter la diversnaciaĵoj dividitaj per lingvaj baroj. Nia Jarlibro en siaj lastaj paĝoj montras al ni, ke fakte eĉ ne unu grava fako, precipe de scienco, restis sen sia peranto preta informi la aliajn pri ĉio koncerna en lia lando. **Sed reprezentitaj estas nur la ĉefaj fakoj : medicino, terkulturo, elektrotekniko, instruado ktp.** Ni scias, kiom da specialaj branĉoj entenas ĉiu ĉefa fako kaj ni ne povas kvieti ĝis en niaj jarlibroj aperos ĉefaj fakoj dividitaj en siaj branĉoj. Posedante tre vastan fak-delegitan reton, ni povas atendi ke tiu fakto altiros al la movado multajn fakulojn, profesorojn, inĝenierojn, doktorojn, kiuj estras laborejojn kaj lernejojn kaj kies opinio kaj influo tre gravas en ilia medio.

La esperantistaj societoj ludas tre gravan rolon, sed informon pri ili la jarlibro liveras al ni nur en formo de asterisko apud la nomo de urbo aŭ loko. Tute nesufiĉa, krome por multaj ankaŭ nekomprenebla. Adreslisto de niaj lokaj societoj kaj grupoj, almenaŭ de tiuj, kiuj konstante laboras kaj posedas propran ejon, estas nepre neceso. Se la amplekso de la jarlibro ne povas elteni tiun aldonon, ĝi bele povus toleri elĵeton de la listo de membro-subtenantoj, kiuj okupas 17 paĝojn kaj la nomoj en la listo ne estas ordigitaj laŭ aboca ordo sed laŭ numeroj de kotizenpago. Trovi iun en tiu listo prezentas veran kapdoloron.

* Plene konsentante kun la aŭtorino, ni atentigas ke la Baza Laborprogramo de UEA (vidu p. 186), kiun ĵus akceptis la Estraro kaj submetos ĝin al la Komitato por diskuto kaj decido, antaŭvidas ankaŭ specialajn agadojn en Afriko kaj Azio.—*Red.*



Esperantista Vivo



Nekrologo

Naskiĝo

Piha. Al Ges. M. Piha, en Alexandria, Egiptujo, je 21 Aprilo naskiĝis tria filo Mario Alino. Gratulon !

Geedziĝo

Ritterspach. La 16-an de Aprilo geedziĝis Gernot Ritterspach kaj Elisabeth Klenert en Heidelberg, Neureut/Karlsruhe. Feliĉon !

ATENTIGO. Nacilingvajn avizojn pri naskiĝo, edziĝo ktp. ni ne povas atenti.

Fine ni esploru, kioma estas la kontribuo de virinoj en pormovada laboro. Britujo estas la lando, kies delegita reto estas plej densa : 218. El tiuj estas 44 virinoj D, FD, kaj VD, do 20%. En aliaj eŭropaj landoj la bildo estas simila. Tamen en la listo de komitatanoj ni trovas nur unu virinon (F-inon Vermaas) kaj nur unu virina ĉefdelegito ekzistas. Kial ? Ĉu virinoj hezitas okupi pli gravajn funkciojn en la movado, aŭ la viraj kolegoj lerte ne lasas virinojn al pozicioj egalaj al iliaj ? En ĉiu okazo virinoj mem devas konkuri en la movado lokon, kiu respondas al ilia forto kaj kapablo.

Tiu malgranda statistika analizo de la Jarlibro 1955 celas nur montri kelkajn direktojn pri kies graveco ĉiuj konscias, sed en analiza formo pli evidentas faktoj kiuj, plibonigitaj, alportus utilajn fruktojn al la movado.

Emilija Lapenna, Zagreb

Al parencoj kaj amikoj de jenaj forpasintaj samideanoj ni esprimas nian koran kondolencon.

Graf. En Entlebuch, Svislando, mortis en Februaro nia delegito S-ro A. Graf.

Wolff. Nia energia batalantino F-ino Helene Wolff forpasis la 27-an de Marto en San Francisko. Ŝi estis del. de UEA de 1943-52.

Lajos. En Februaro mortis la iama estro de la hungara Esperanta asocio, kanoniko Julio Lajos. Li estis tre agema ano de la esperantistaro, kiu antaŭ la lasta mondmilito plurfoje faris la diservon katolikan ĉe landaj kongresoj. "Li ege mankas," skribas nia korespondanto, D-ro A. Kennessey. "al niaj maldensigitaj vicoj."

Lanoux. Je la 29-a de marto, en Alès, Francujo, S-ino Lanoux, prezidantino de la loka grupo. S-ro René Llech-Walter, Prezidanto de Esperanta Federacio, per kortuŝaj Esperantaj vortoj alportis la lastan saluton de la esperantistaro.

Mrkšič, S-ino Jelica, anino de UEA, forpasis 6an de Aprilo 1955 en Subotica, Jugoslavio.

Kalma. Je 24-a de Marto, Mag. A. J. Kalma, sekretario de LEEN.

Scholten ten Cate. En Hago je 5-a de Marto, S-ino A. Scholten ten Cate, multjara membro.

XVI

1955

HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

GIJON

Tagoj 23 - 24 - 25 - 26

kun solena fermo je

la lasta tago 27 de

Julio en la bela urbo

OVIEDO

Ĉarma somero.

Milda klimato.

Kosmopolita moderna strando.

Maro-Kampo-Arbaro-Urbo.

Amuzoj-Vivplezuro.

KONGRESO DE ESPERANTO !!

40% rabato de fervojkosto

de la 18a Julio ĝis la 6a Aŭgusto.

Fremdaj aliĝoj senpage !


Ernest Paul :

La mirmekofagoj

EN antaŭa artikolo* mi skizis la vivhistorion de la termitoj. Ĉiu leginto sendube konsentos, ke ĝi estas stranga, ĝi estas tamen ne pli stranga ol la historio de la bestoj, kiuj rabkaptas ilin, kies vivrimedon ili liveras, kaj kiuj baldaŭ mortmalsatus, se termitoj kaj formikoj mankus al ili.

La grupo konsistas el la tielnomataj mirmekofagoj (la nomo signifas laŭlitere: formikmanĝantoj), kune kun unu-du aliaj, ne precize tiel nomataj, sed kies ĉefan vivrimedon provizas diversaj specoj de formikoj kaj termitoj, ekz. la “terporko”, loĝanto de Sudaŭfriko, kaj la Azia maniso.

Ĉiuj ĉi tiuj estas anoj de arĥaika




Maniso

mamulgrupo nomata Edentatoj, preskaŭ aŭ tute sendentaj; la grupo enkadras la bradipojn kaj dazipojn de Sudameriko, kiuj tamen estas parte vegetaranoj, mi do ne traktos pri ĉi tiuj.

La edentatoj ne ampleksas ĉiujn formikmanĝantojn, kaj mi devus

* *Vidu Nov. 1954, p. 301*

mallonge menciĝi unu-du aliajn—la Aŭstraliajn eĥidnon kaj la “mont-diablon” aŭ “Jorkdiablon”, dornkovritan lacerton. La tuta grupo de edentatoj liveras ekzemplon pri specialiĝo daŭrigita ĝis la limo de animala evoluo—ĉiam danĝera trajto, ĉar la bestoj per tio kvazaŭ metas “ĉiujn ovojn en unu korbon”. Ĉiuj



La granda formikmanĝulo

edentatoj estas strangaspektaj, groteskaj, malbelaj kreitoj, sendube destinitaj de la naturo al pli-malpli baldaŭa forpaso, kvankam iam ili formis superregan grupon, precipe en Patagonio, de kie reportis C. Darwin la ostojn de pratempaj gigantoj, pli grandajn ol ostoj elefantaj, poste kunmetitajn en la Naturscienca Muzeo en Londono. Ili estas la prapatroj de la bradipo, kaj kvankam ili nepre aspektis tre timinde, troviĝas signoj ke la prahomoj enstaligis ilin en kavernojn kaj sin nutris per ilia karno, simile al hodiaŭaj farmbestoj.


Troviĝis ankaŭ la pratempaj gliptodontoj: la kirasitaj tankoj de la besta regno, prapatroj de la dazipo; nekapteblaj en sia osta karapaco kaj

tiel pezaj, ke forta viro apenaŭ povas levi la finan artikoston de la vosto !

La naturo verŝajne laciĝis de ili kaj lasis ilin formorti.

Ni reiru al la mirmekofagoj kiuj, kvankam ne havante tian historian allogon, tamen meritas atenton ĉar, kiel mi jam diris, troviĝas tie la specialiĝo ĉe sia plej freneza limo.

Ili estas tute sendentaj. La buŝo, majstraĵo de malordinara arkitekturo, konsistas el longa cilindro kun finaĵo malfermebla : tra ĉi tiu aperturo sin ĵetadas longa vermsimila lango por alkapti termitojn kaj aliajn insektojn kaj larvojn. La korpaj haroj estas longaj kaj maldelikataj, simile al unujaraĝa fojno ; la vosto estas vasta kaj dense kovrita de haroj samspecaj kaj, kvazaŭ sternita tendo, kovras la kuŝantan beston. En tiu rilato ili similas la bradipojn ; kaj




Terporkoj disŝiras termitejon

permese de eld. Hutchinson

krome ili posedas terurajn ungojn, perfektigitajn por trabati kaj venki la obstinajn fortikaĵojn de la termitoj. Ĉar la ungoj devas esti ŝirmitaj, la besto ne kuraĝas uzi ilin por marŝado, do antaŭentrotas, turnante la pied-fingrojn malantaŭen sur la fleksitaj fingroartikoj. Iuj malgrandaj specoj

pendadas per la vosto surarbaraj branĉoj kaj disungas la aerajn nestojn troveblajn tie, inter la branĉaro kaj konstruitajn de iuj specoj de termitoj.

La esploristo Bates trovis la mirmekofagojn ferocaj batalantoj. Atakite de homo, la surtera mirmekofago kapablas faligi kaj ĝismorte disŝiri lin, kaj granda specimeno mortungis la plej fortan hundon de Bates.



Montdiablo aŭ Jorkdiablo

permese de eld. Hutchinson

La manisoj de Sudorienta Azio ankaŭ estas tute sendentaj, kaj tute kovritaj de karapaco el dikaj kornecaj skvamoj. Ili similas grandajn piceajn strobilojn, starigitajn sur kvar piedoj. Ili estas fortunaj kaj longlangaj kaj atingas longecon de eble du metroj—konsternaj kreitoj, tamen tute senofendaj ; fakte ili estas bonaj amikoj al la homo pro tio, ke ili subpremadas la diversajn specojn de formikoj kaj termitoj.

Ilia vivideo estas defendo, ne defio, ĉar, je la proksimiĝo de danĝero, ili sin envolvas kiel gigantaj oniskoj, kaj apenaŭ povas esti malvolvitaj per neperfortaj rimedoj.

Fine mi prezentu la t.n. "terporkojn" aŭ *Aardvark* de la Buroj de Sudafriko.

Porkoj ili certe ne estas, malgraŭ la longa, mallarĝa, porkosimila rostro. La lango, vipsimila glueca rubando, sin elĵetante fulmrapide, faras vastajn detruojn inter la termitoj, kiujn la rapidfosaj ungegoj malkovras.

Troviĝas nur kelkaj dentoj en la flankoj de la makzelo ; la oreloj estas grandegaj, la vosto dika kaj malgracia. Ili atingas la longecon de unu metro kaj duono. Ili havas strangan kapablon subite malaperi, eĉ en maldensejoj kaj sur tre malmola tero — tion ili faras per rapidega sin-enterigo. Ili estas timemaj kaj nur nokte kuraĝas eliri.

La edentatoj ilustras la kunligitajn ecojn de genio kaj frenezeco : la plej alte specialiĝinta ano, la dufingra bradipo, estas la plej senpova — perfekta nur en sia arba medio ; sed ŝtormo, sekeco aŭ la arba hakilo de la homo povas ekstermi tutajn koloniojn.

La grupo liveras averton al la homaro : ke strebi, peni laŭ ŝtormaj vojoj kaj kontraŭ tumultaj tajdoj estas la sola espero por atingi dignan celon. La vojo de plej malgranda rezisto kondukas la specon, kiel ankaŭ la individuon, nur al fina pereco.

feroca = sovaĝe atakema

Blufo kaj blago

Ĉu aliaj junuloj spertis kiel mi la trompon, per kiu veteranaj literaturamantoj nin logas al la lingvo ? La artifiko estas simpla. Ili fervoras pri la kultura matureco de Esperanto, kaj samtempe ili demonstras la pompon de nia literaturo per diversaj libroj, kiujn ili eltiras el sia ŝranko. Sonas al ni Baghy, Kalocsay, Hohlov, Carlsson, Lukaŝ k.c., ni estas ravitaj, konvinkitaj ; ni ĵuras, ke indas lerni Esperanton nur por partopreni tiun kulturon, kaj poste . . . ni vane serĉas sur la katalogoj pri eĉ unu verko de la diritaj majstroj. Kiam ni turnas nin al nia mentoro, li grandanime proponas, ke ni pruntu el liaj libroj, kiujn li feliĉe akiris antaŭ la jaro 1939 . . .


La bonaj homoj vidas nenion misan en tia procedo. Sed mi pretendas, ke tia literaturo, kiu kuŝas nur sur la bretoj de la maljuna generacio, estas literaturo ne vivanta, sed muzea. Por ili ne ; sed por ni pli junaj, la verkoj ne plu haveblaj estas kvazaŭ por ili la

Faraona traduko de Kabe : verko, kiom ajn bona, eĉ superba, tamen perdinta kontakton kun la vivo simple pro tio, ke la esperantistaro entute ne sufiĉe ŝatas ĝin por reeldoni ĝin. *Kaj tiujn verkojn oni povos atribui al nia literaturo nur tiam, kiam ili reeniros la vivon* : ne ombre, kiel verkoj ŝance akireblaj se iu vendos siajn trezorojn, sed reale per ilia reapero sur la katalogoj de niaj eldonistoj kaj libroservoj.

Kaj ĝis tiam, se iu fanfaronos al mi pri “niaj” Grabowski, Kalocsay, Baghy *et hoc genus omne*, mi levos mian libroliston kaj respondos : Ĉi tiu katalogo diras, ke vi mensogas. Nur blufo kaj blago estas tia literaturo, kiun oni devas elfosi el arkivo ! Ni, kiuj opinias tion, ne estas ia manpleno, sed ni estas kelkcentopo, preta aĉeti kaj reale entuziasmi pri tiuj verkoj. Kial dormas la Esperantaj eldonistoj ?

Leslie Govier

superba = majeste bela



Radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Dimanĉo	23.00–23.30	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.45–23.00	Hilversum. 402m. P. N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur unu fojon ĉiumonate).
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	14.50–15.00	Ljubljana. 327m., 211m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur.
	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	18.10–18.25	Roma. 49.92m., 31.33m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	22.05–22.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45–06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45–23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.10–18.25	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 370m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, La Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.7m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	18.45–19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Aŭskultebleco de stacioj. Por respondi al diversaj demandoj aŭ plendoj, jen klasigita listo de la ĉisupraj stacioj laŭ trafpoŭvo.

(a) Ebla aŭskultado en la tuta mondo (laŭ neantaŭvideblaj lokaj kondiĉoj) : ĉiuj elsendoj per ondoj de 15 ĝis 50 metroj, do—Bern, Roma, Wien, Guatemala, Rio de Janeiro.

(b) Ebla aŭskultado en la najbaraj landoj ; pli malpli bone en la Eŭropa kontinento kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj laŭ distanco kaj atmosferaj kondiĉoj : Hilversum, Zagreb, Barcelona, Bilbao.

(c) Nur loka aŭdebleco : La aliaj stacioj.

Radio-babiloj

*La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas.*

La celo de ĉi tiu nova rubriko estas atentigi la Esperantistojn pri la jam aŭskulteblaj dissendoj en Esperanto kaj instigi ilin skribi al la aŭskultitaj stacioj por danki pro tiaj dissendoj aŭ por atentigi pri la aplikeco de Esperanto.

Esperantistigado per radio

Mi mem Esperantistiĝis per radio-kurso. Tiel la diversnaciaj radiostacioj povus en kunlaboro formi grandegan komunlingvan aŭskultantaron. La nederlandaj stacioj okazigis antaŭ la milito Esperanto-kursojn, kiuj verdigis multajn nederlandanojn kaj flandrojn. Post la milito la nederlandaj diverstendencaj radio-disaŭdigaj asocioj aplikas Esperanton nur por propagandi siajn proprajn ideojn: KRO donas nun nur rom-katolikajn novaĵojn, NCRV diskonigas la biblion per Esperanto kaj VARA dissendas socialistajn komunikojn. Tia uzo certe montras la taŭgecon de Esperanto kiel internacia diskonigilo, sed la radio-stacio kreu Esperanto-aŭskultantaron per Esperanto-radio-kursoj, alie iliaj Esperanto-voĉoj estos tiuj de vokantoj en la dezerto. Se ĉiulandaj radiostacioj ĉiutage instruus Esperanton kiel BBC trifoje tage instruas la anglan lingvon, ili baldaŭ havus grandan Esp.-aŭskultantaron.

Petu vian propralandan radio-istancon aranĝi Esperanto-radio-kurson. Bona ekzemplo kaŭzos alilandan imiton.

La dana radio denove dissendis en Esperanto !

Kalundborg estis la unua stacio eksterlanda, per kiu mi ĉiusemajne aŭdis Esperanton. Poste ĝi silentis en Esp. Sed 30/III/1955 la dana radio denove okazigis dissendon en Esp. okaze de la 150-jara datreveno de la naskiĝo de la fama verkisto H. C. Andersen. La aktoro Miskow Makwarth voĉlegis interesan fabelon de Andersen (kun iom tro da dana akcento : li forte aŭdigis h-sonon post ĉiu konsonanto, kio estas ja evitinda ; la anoncisto ne faris tiun eraron). Ni ĝojis pro tiu kvaronhoro da Esp. Ĉu ankaŭ vi ? Skribu al Statsradiofonien, Rosenørnsalle 22, Kopenhago (Danlando). Agante tiel vi helpas la laboron por havigi pli da dissendoj en Esperanto pere de la dana radio.

Radio Roma

Dum la somero la dissendoj de Radio Roma estas malpli bone aŭdeblaj. Almenaŭ mi ne ofte sukcesis kapti ambaŭ ondojn. Germana aŭskultanto sciigis al mi, ke li aŭdis la saman Esperanto-programon per ondo 43.80m., kiun ondon la anoncisto ne menciis. Ni ne havis okazon kontroli ĝis nun. La 49.92 metra ondo estas sufiĉa forta, sed terure ĝenata de aliaj stacioj.

Radio Zagreb

La malfrua horo de ĉi tiu stacio estas por la pliparto da Esperantistoj tre malpraktika, sed en la somero ĝi donas avantaĝon, ĉar dum mallumo la aŭdebleco estas pli granda.

La programoj estas variaj kaj tre aŭskultindaj.

S. S. de Jong



Enigma Konkurso N-ro 99

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 89 Av. du Sacré Coeur, Brussel-Jette, Belgujo.

Solvoj :

N-ro 217 : Se amiko
petas, li neniam ripetas.
sufragano - ekspansio -

aŭtografo - makaronio - imperialo -
kartilago - oftalmito - pastinako -
elektrono - tamburino - atmosfero -
sublimato - laminario - intervalo -
neŭralgio - elokventi - narkotiko -
inventaro - apostrofo - medaliono -
ranunkolo - intermito - postulato -
eskadrono - trobadoro - araŭkario -
sanatorio.

N-ro 219 : Horizontale : arkta-
ĝirafstreĉ - rivelinerttriki - kveriresti -
rikan - terenartezekagu - alineftizo-
ĉinuj - ŝaradknedipasko - arane-
numeraktor - rafinemocistare - aniza-
- decidkoral - denariridoorelo -
elipsileksskalo - lariklimakkaras -
ironiemanoarmit - pintekanellaiko -
skiejskoloostoj.

N-ro 220 : Rezonado kaj filozofado
panon ne donas. Pelu mizeron tra
l'pordo, ĝi revenos tra l'fenestro.
Malsaĝulo ŝtonon ĵetas, dek saĝuloj
ĝin ne atingos. Lernado havas
maldolĉan radikon sed bonan efikon.
Kapricoj de grandsinjoroj, kaj
multego da kreditoroj. La du
eraretoj, kiuj troviĝis en ĉi tiu
enigmo : ĉe 3 "fos" anstataŭ "gos"
kaj ĉe 5 "ajn" anstataŭ "ajm" estis
preseraretoj. Gajnis la premiojn post
kontrolo de la 95-a konkurso : S-ro
R. Iserentant (Belg.) 114, F-ino L. v.
Waldowski (Germ.) 112, S-ro A. v.
Wijnen (Ned.) 108 p.

Enigmo N-ro 228 : dinamo -
brando - skiado - glando - korano -
propra - ironie - spleno - diablo -
stoplo - raboti - lapiso - triaso -

panelo - sturno - paliso - sporto -
stadio - strofo - pasero - pirato -
favoro - katuno - triofo - kareso -
pastro.

Anstataŭigu unu el la literoj de la
ĉi-supraj 26 vortoj per alia litero tiel,
ke de la novaj sesoj da literoj vi povas
formi vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj.
La novaj literoj formas en la donita
sinsekvo esprimon el la Proverbaro.

1. Fortiga manĝaĵo ; 2. Pastro ;
3. Parto de la stomako ; 4. Ornama
rubando ; 5. Korpoparto ; 6. Pak-
materialo ; 7. Logike paroli ; 8.
Fekundiga polvo ; 9. Blankharulo ;
10. Entuziasma esprimoj de pensoj ;
11. Okuldifekto ; 12. Parto de sango ;
13. Bela floro ; 14. Piedoparto ;
15. Nevenkebla kutimo ; 16. Maldika
lignopeco ; 17. Forta deziro ; 18.
Bela floro ; 19. Malbonaodoro ;
20. Maldika pastaĵo ; 21. Spirite
vigla ; 22. Gasa nubo ; 23. Arbo-
parto ; 24. Gruzo ; 25. Linio ; 26.
Akra kritiko.

Enigmo N-ro 224 : Ĉi-sube sekvas
19 paroj da klarigoj. La unua ĉiam
koncernas sepliteran vorton, la dua
kvinliteran vorton. La du vortoj
havas kvin komunajn literojn. Metu
la ne-komunajn literojn en la donita
sinsekvo unu post la alian, kaj vi
trovos esprimon el la Proverbaro de
D-ro Zamenhof.

1. vorto speciala al iu scienco -
arbeto kun ĉiam verdaj folioj ; 2.
amerika vulturo - natura pikilo de
planto ; 3. tre aroma vegetaĵo uzata
kiel spicaĵo - ago kiel alia persono ;
4. miriga pro eksterordinareco - dika ;
5. batilo - publika veturilo ; 6. danĝera
rabobesto - jara profito de mono ;

FERIU EN NEDERLANDO!

Partoprenu la Internacian Kulturen Semajnon

Nederlando, dek jarojn post la Liberigo de la 22-a ĝis la 29-a de Julio 1955 (ĝuste antaŭ la UEA- kaj SAT-Kongresoj) okaze de la grandioza

Nacia Ekspozicio en

ROTTERDAM "E 55"

organizita de Roterdama Esperanto-Komitato en belege situanta Konferenc-ejo en la kamparo apud Rotterdam.

Vidu artikolon en aprila numero!

Kotizo, inkluzive ĉion (restadon, manĝojn, prelegojn, ekskursojn, kulturajn aranĝojn ktp.): 100.— ned. gld.

Petu informojn kaj aliĝilon ĉe:

**F-ino A. C. Obbes, sekr. R.E.K.,
Boezemlaan 24 b, Rotterdam N**

aŭ

**F-ino M. H. Vermaas, prez. R.E.K.,
Nieuwe Binnenweg 70, Rotterdam C**

Infanaĵo. Aŭdo, infano: Kial vi rompis tiun vitron?

Panjo, mi ne rompis ĝin. La kulpulo estas Joĉjo, kiu, kiam mi ĵetis al li la ŝtoneton, ekkaŭris.

7. brulaĵo - vintra mantelo; 8. agrablaodoro - platboato; 9. plaĝo - piedparto; 10. juĝafero - arbo kies frukto nur tromatura estas manĝebla; 11. malobservi sanktecon de religiaĵoj - bati; 12. vizaĝoparto - io alta; 13. lilako - ekstera distingilo; 14. bruligilo - ĝerminta sekigita greno; 15. frukto de sovaĝa arbeto el famrozacoj - sudamerika lando; 16. malfermaĵo de vulkano - nekurba linio; 17. grado de boneco - haŭtŝmiraĵo; 18. tempa daŭro inter du fazoj de fenomeno - estrado; 19. armilo - fiago.

Kunlaborado de UEA kun UNESKO

Surbaze de la decido de la Estraro Prof. I. Lapenna vizitis la Sekretariaton de UNESKO en Parizo kaj havis tie plurajn konversaciojn kun la reprezentantoj de diversaj fakoj. La celo de la vizito estis fiksi la formojn de plua kunlaborado inter UNESKO kaj UEA.

La konversacioj rilatis al interŝanĝo de publikaĵoj, reprezentigo de la landaj asocioj en la naciaj UNESKO-komisionoj, instruado de Esperanto en la lernejoj, reprezentigo de UEA en konferencoj de neŝtataj organizaĵoj, lerneja korespondado kaj interŝanĝoj sub aŭspicioj de UNESKO, utiligo de Esperanto por koordinataj eksperimentaj aktivecoj en la lernejoj, someraj kursoj en Esperanto pri internacia komprenigo kaj metodoj por la forigo de internacia streĉiteco, edukado al monda civitaneco, kunlaborado en sociologiaj esploroj, *Index Translationum*, publikigo de tradukoj en Esperanto el la revuoj de UNESKO *Diogenes* kaj *Courier*, partopreno en la Internacia Federacio de Tradukantoj kaj en la Internacia Federacio pri Modernaj Lingvoj, publikigo de informoj pri la atingajoj de Esperanto en diversaj revuoj kaj publikaĵoj de UNESKO.

Pri ĉiuj menciitaj punktoj, kiel ankaŭ pri kelkaj aliaj malpli gravaj, estas atingita plena interkonsento, kiu ebligas utilan kunlaboradon en la aferoj, kiuj interesas ambaŭ organizaĵojn.


La landaj asocioj kaj la kunlaborantoj en diversaj landoj, kiel ankaŭ la Komitato de UEA, jam ricevis detalajn informojn pri la afero kaj plurajn sugestojn kaj konsilojn pri la plenumota laboro.

★ ★ ★

Florurbo Gent. Neordinare bela prospekto kun multaj koloraj bildoj kaj urboplano. Ricevebla ŝajne senpage de Urba Oficejo por Turismo, Burgemeester Braunplein 6, GENT, Belgujo.

Valencio, ideala urbo por la tuta jaro. Bonguste ilustrita per plumdesegnoj kaj ricevebla per peto sur bildkarto al Sociedad Valenciana Fomento del Turismo, Bajos del Ayuntamiento, VALENCIA.

Konstanz. Bela kolora prospekto kun Esperanta resumo.



Novaj Libroj

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵn ni nur mencias.

* = *ricevable* ĉe U.E.A.

Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto, de D-ro L. L. Zamenhof, 17-a eldono ; The Esperanto Publishing Co., 1954. Bindita, 18ŝ. 9p., afranko 1ŝ. 3p.

Oni ne povas tro danki al la eldonejo kaj al la pretigintoj de tiu 17-a eldono, pro la servo, kiun ili faris al la movado. Efektive, pro bedaŭrindaj cirkonstancoj, la firmo, kiu antaŭ la milito eldonadis la verkaron de Zamenhof, ŝajnis rezigni pri tiu tasko, kiun multaj rigardus devo, kaj lasis iom post iom elĉerpiĝi preskaŭ ĉiujn verkojn de nia Majstro ; tiel ke, en la ĉijara kongreso, kiu celebros la 50an datrevenon de la Bulonja Deklaro kaj de la unuanima akcepto de la *Fundamento*, la kongresanoj eĉ ne povos havigi al si unu ekzempleron de tiu esenca libro ! Almenaŭ tiun ĉi alian fundamentan verkon ili povos de nun aĉetadi, kaj legadi.

Dua motivo por danko estas, ke tiun reeldonon oni faris kun plena zorgo kaj diligento. La F.K. estas ĉefe kolekto de artikoloj aŭ artikol-etoj, kiuj aperis en la unuaj jaroj de "La Esperantisto", kaj plejparte Zamenhof lasis ilin tiaj, kiaj ili aperis, kune kun la arkaikiĝintaj formoj aŭ dirmanieroj : nur la gramatikajn erarojn li korektis. Estis do necese, post pli ol kvindek jaroj, se oni volis, ke tia verko konservu sian normigan karakteron, averti la legantojn kontraŭ la lingvaĵoj, kiuj ne respondas al la propra stilo de Zamenhof.

Aliflanke, pro la fundamenteco de la verko, estis dezirinde, ke la teksto mem restu neŝanĝita. Tial oni elektis la saman procedon, kiun mi uzis en la eldono de la "Leteroj de Zamenhof", t.e. oni indikis per piednotoj la farindajn modifojn. La laboro estis komisiita al S-ro William Bailey, kaj, post lia morto, al la heredinto de liaj laboriloj kaj sliparo, Ak-ano W. J. Downes. Mi tuj diru, ke, por la plej granda parto, tiu laboro estis ĝuste kaj kompetente farita, kaj la tri kvaronojn de la notoj mi plene aprobas. Tial, se ĉi-sube, mi ŝajnas insisti pri dubaj aŭ eĉ eraraj punktoj, oni bonvolu vidi, en ĉi tiu detala listigo, nur sinceran deziron pri plibonigo de la venontaj eldonoj, kaj tute ne ian sisteman, malbonintencan kritikon.

La plej frapa karaktero de la prinotado estas eble la manko de metodo. Mi ne aludas simple la fakton, ke kelkaj detalaj notoj estas ripetitaj senbezone (p. 17 kaj 135 ; 136 kaj 137 ; 172 kaj 173 ; 206 kaj 207) ; aŭ tiun alian difekton, ke la notoj de la originala eldono, do de Zamenhof mem, ne estas distingitaj de la notoj de la komentintoj ; aŭ ke la historiaj klarigoj estas donitaj kvazaŭ hazarde (oni informas nin, p. 370, ke Nadson estis rusa poeto ; sed oni ne klarigas, p. 253, ke Unuel estas la mallongigo de "Unu el ĉiuj", aŭ, p. 439, ke la "Preĝo sub la verda standardo" estis verkita por, kaj

kaj deklamita en la Unua Kongreso ktp.) Mi celas ĝuste tiujn frazojn de la antaŭparolo, en kiu S-ro Downes deklaras: “Oni do povas juste supozi, ke, se la Majstro estus povinta vivi pluajn jarojn, li estus kaptinta la unuan okazon fari elfundan revizion de F.K., por akordigi ĝian stilon kun la vere matura stilo, kiun li tiam uzis” (p. XIII), kaj “la unuanima opinio estis . . . ke oni indiku per piednotoj la ŝanĝojn, kiujn Zamenhof mem plejeble aprobus” (p. XIV). Tiuj linioj klare difinis ian taskon precizan, kaj sufiĉe facile efektivegeblan. Sed la komentintoj ne limigis sin je tio: ili plurfoje prezentis en la piednotoj ŝanĝojn, kiuj tute ne apartenas al la stilo de Zamenhof, kaj kiuj montras nur la personajn gustojn de la korektintoj. Kompreneble, ĉiu el ni rajtas havi kaj libere esprimi lingvajn preferojn: sed enkonduki ilin, eĉ piednote, en eldonon de ia fundamenta dokumento, tio estas kovri ilin per ia oficialeco, kaj kvazaŭ (pro la averto en la antaŭparolo) atribui ilin al Zamenhof mem. Tia agmaniero estas ne nur grava scienca mispaŝo, sed rekta peko kontraŭ la intereso de la movado. Ĉar en tiu verko, kiu devis servi al ĉiuj kiel modelo de la bona stilo Esperanta, oni ne rajtas enmeti aferojn, pri kiuj konsentas ne ĉiuj esperantaj verkistoj. La sola tereno, sur kiu oni povis firme stari, ne timante ian ajn kontraŭdiron, estis la historie konata, de ĉiuj kontrolebla stiluzado de Zamenhof. Estas ja kelkaj punktoj, ĉe kiuj la hodiaŭa uzado ŝajnas disiĝi disde la Zamenhofa: sed tiuj hodiaŭaj dirmanieroj eble ne estas tiel ĝeneralaj, nek tiel definitive alprenitaj, kiel povas unuavide ŝajni, se oni iom vaste legadas kaj diskutadas; kaj aliflanke, oni neniam devas forgesi,

ke, eĉ se unu Zamenhofa lingvaĵo fariĝis ekstermoda, ĝi tamen konservas sian valoron kaj intereson, ĉar Zamenhof estis ne nur la elpensinto de Esperanto, sed ĝia plej eminenta stilisto, kaj, verdire, ĝia sola klasikulo. Tial liaj solvoj estas la solaj, kiujn oni rajtis enlasi en la prinotadon de tia klasikaĵo, la solaj, pri kiuj, pro ilia jam historia karaktero, ne povas estiĝi malkonsentoj kaj diskutoj, kion eviti estis ĝuste la celo de la starigo de F.K.

Mi nun detale esploros tiun notmaterialon.

I. Mankoj. (a) Mi opinias, ke multaj uzontoj estus dezirintaj ekscii, kiaj partoj de F.K. estis verkitaj de la propra mano de Zamenhof. La listo estis donita de li mem, en letero al Cart (Originala Verkaro, p. 557): estus facile ĝin aldoni al la tabelo de enhavo.

(b) Oni devus averti kontraŭ la tro abunda uzado de la prefikso **ek-**, kiu aperas, pro influo de la slavaj lingvoj, en pluraj pecoj komence de la libro, precipe en la “Deveno de la Virino” (28 ekzemploj en du paĝoj, 26-28).

(c) Pluraj neĝustaj uzoj de prepozicioj ne estas montritaj: p. 25/18: “kiel li ja tuj vidis sur (=pri) si mem”; p. 65/34: “sur (=dum) la ĉaso”; p. 66/11: “restas muta por (=kontraŭ) ĉiuj liaj demandoj”; p. 72/17: “malfruis al (=en) la komenco de leciono”; p. 72/20: “al (=ĉe) la miro de la studentoj”; p. 81/6: “ŝi estas ĉirkaŭrabita (=prirabita) de liaj soldatoj” ktp.

(d) En la komenca, tiel nomata rusa periodo, oni uzadis la subjunkcion **kvankam** kun adverba valoro, por la du signifoj de “ja, verdire, sendube, konfesinde”, aŭ de “eĉ, almenaŭ”. Nu, tiu konstanta uzado estas ĝuste prinotita p. 125, n. 1, ne tre bone klarigita p. 115, n. 2—sed malĝuste montrita en tri lokoj (p. 126, n. 1; 208, n. 1; 247, n. 5) kaj tute preterlasita en du aliaj (p. 18/10; 71/19): unu detala klarigo kaj postaj referencoj al ĝi estus pli oportunaj.

(e) Oni prave indikis (p. 146, n. 7), ke **pensio** havas tie la signifon de la poste oficialigita **pensiono**; sed oni forgesis rimarkigi la samon, p. 298, kie en la 23a verso de “La Espero”, **sonĝo** estas arkaikaĵo anstataŭ **revo**.

II. Duboj. (1) Estis la granda batal-ĉevalo de W. Bailey, ke **tiu ĉi** kaj la analogaj formoj estas ekstermindaj, favore al **ĉi tiu** ktp. Li apogis sin sur unu Lingva Respondo (citita jam en la unua noto !): sed li ĝuste preteratentis la signifan adverbbon, kiun Zamenhof zorge enmetis en sian frazon: “pro belsoneco ordinare estas preferinde starigi **ĉi** antaŭ la montra vorto”. Ĉu tia singardema indiko devigis la komentintojn reforĝi tute novajn kvin versojn de Hamleto?

(2) Ordinare la komentintoj montras sin tre rigoraj por la vortkunmetado, postulante ekz-e **konstruaĵo** anstataŭ **konstruo**, **aperaĵo** anst. **apero**: ili ŝajne ne agnoskas la regulojn de la kunmetado proponitajn de Saussure kaj oficiale akceptitajn de la Lingva Komitato: **apero** estas resuma formo, tute klara, tute Zamenhofa, kaj perfekte korekta, precipe en poezia teksto.

Same, ili ne bone komprenas la uzadon Zamenhofan de la adjektivo senpere derivita el verba radiko: tia adjektivo esprimas larĝasence la ideon de la radiko, sed, ĉar adjektivo, ne enhavas en si la transitivan aŭ netransitivan valoron: **bezona** kvalifikas ion, pri kio oni sentas ian bezonon, kaj ne devige aŭ **bezonata** aŭ **bezonanta**. La klasika uzado estas multe pli tolerema, ol kiom kredigus la tro logikemaj spiritoj.

Saman maltoleron, kaj iafoje eraran aplikon de la logiko, oni trovas en kelkaj notoj pri vortoj kunmetitaj el pluraj elementoj. Ekz-e “murofortega” estas bone formita vorto (urbo fortega de muro), kaj la noto “legu: murafortega” (p. 425, n. 2) estas eraro, ĉar tiu lasta formo signifus “murhava kaj fortega”. Korekti (p. 424, n. 2) “ĝojookula” per “ĝojaokula” estas allasebla, kvankam la unua ne estas erara; sed tre duba estas la neceso korekti (p. 437, n. 2) “bovookula” per “bovaokula”—dum la ĝusta formo estus “bovinokula”. Kaj kial do ŝanĝi ĉie “piedorapida” per “rapida-pieda”, sub la preteksto ke Kofman uzis jen la unuan jen la duan formon? Ambaŭ estas allaseblaj, sed mi persone preferas la unuan, ĉar la ĉefa ideo estas ja la rapido, ne la piedoj!

III. Miskomprenoj. Sur la p. 33, 34 oni legas (temas pri la junaj marfeinoj): “la tutan tagon ili povis ludi en la palaco, en la grandaj salonoj, kie vivaj floroj elkreskadis el la muroj. La grandaj sukcenaj fenestroj estis malfermataj, kaj tiam la fiŝoj ennaĝadis al ili . . .” La notoj 1 kaj 2 montras, ke la komentinto ne komprenis la tekston: li volas korekti per “malfermitaj” kaj “tial”:

sed la signifo estas ja, ke ĉiutage, kutime, ripete, la fenestroj estas malfermataj, kaj en tiu tempo, sed ne en la noktoj, la fiŝoj ennaĝadas.

Tiu sama signifo de ripeta aspekto ĉe la at-participo estas miskomprenita de la komentintoj p. 146, n. 3; 148, n. 6; 181, n. 1—ĉiuj lokoj, en kiuj ili volas korekti per it-participo: tiu uzado de **ata** kun valoro de ordinara, ripetata ago estas tamen tre rekonebla trajto de la stilo de Zamenhof (kp. la proverbon: “kio estas permesata al Jupitero, ne estas permesata al bovo”, kaj aliajn ekzemplojn en la “Plena Gramatiko” Para. 241 !)

Alia miskompreno de la teksto okazis p. 288 (temas pri la interlingvistoj): “multaj entreprenas tian laboron; sed . . . ili puŝiĝas je tiom da malhelpoj . . . , ke ili perdas ĉian paciencon.” Pri tiu “je” (alia batalĉevalo de W. Bailey), noto diras: legu **de**, ĉar temas pri kaŭzado”. Tute ne temas pri kaŭzado: “puŝiĝas je io” signifas simple “kolizii kontraŭ io, trafi sur ion”, kaj tiun informon la komentinto povis trovi en la “Plena Vortaro”.

IV. Eraroj. La komentintoj instruas, en noto sub paĝo 206, ke **kurso** havas nur du sencojn (1. serio da lecionoj; 2. takso por interŝanĝo de objektoj) kaj sekve ne povas havi la signifon de “vojlinio”. Mi opinias, ke en tio enestas du eraroj: unue, la dua senco estas nun ordinare esprimate per “kurzo” (en borso); due, la vorto **kurs** estis oficialigita en la Unua Aldono ĝuste sur la bazo de ĝia uzo en la F.K., do kun la senco ĉi tie kondamnita; la franca, angla, germana kaj rusa tradukoj enhavas efektive tiun sencon; Zamenhof mem uzis ĝin en tiu sama senco sur la p. 255 (kie ĝi estas erare glosita “kuradis”; la vera ekvivalento estas “cirkulis”). Kaj finfine, **kurso** ŝajnas, por tiu signifo, nete preferinda al la monstra “raŭto”, proponita en la Fervoja Terminaro.

(b) Pri la uzado de la prepozicio **pro** ĉe Zamenhof regas ankaŭ konfuzo. Estis la doktrino de W. Bailey, ke Zamenhof uzadis **de** por montri la kaŭzon kaj **pro** por montri la motivon, kaj tiun doktrinon ni parte enlasis en la “Plena Gramatiko”-n. Sed de tiu tempo, mi esploris la demandon, kaj trovis tiom da ekzemploj, en kiuj Zamenhof uzadis **pro** rilate al kaŭzo, ke en siaj lastaj jaroj W. Bailey mem konvinkigis pri sia eraro. La notoj p. 22, n. 1, 355; n. 3 ktp. devas do esti forstrekitaj.

(c) Estas alia konfuzo pri la loko de la negacio. Oni scias, ke ordinare ĝi staras ĝuste antaŭ la neata vorto. Sed tiu regulo ne estas aplikata de Zamenhof ĉe la helpverboj esti, devi, voli, povi. Zamenhof, kaj ĉiuj Esperantistoj, diras “mi ne estas amata” (kaj ne: mi estas ne amata), “mi ne volas kanti”, “mi ne povas naĝi” ktp. Estas do neeviteble, ke oni diros analoge “vi ne devas mensogi”, eĉ se la strikta logiko postulus “vi devas ne mensogi”. Sed niaj modernaj reformemuloj, kiuj ŝajne ne scias, ke analogio ĉiam ludis pli grandan rolon ol logiko en la lingvaj aferoj, instruadas, ke oni diru “vi devas ne mensogi”, spite al la natura tendenco de preskaŭ ĉiuj popoloj. Tion instrui estas ilia rajto; sed ne estis rajto por la komentintoj de F.K. enkonduki, eĉ nur en la notojn, tiun stil-apartaĵon, kiu estis ĉiam fremda al Zamenhof kaj al la pli granda parto de la esperantaj verkistoj.

(d) La problemo de **unu** estas bone komentita en la aldona noto de la p. 441. Sed, ĉar tie la komentinto, kaj tute prave, deklaras, ke tia uzo estas allasebla en iaj okazoj, “ekz-e **unu tagon** = je iu tago, al kiu mi aludas”, kial do tiu esprimo “unu tagon” estas ĉie aliloke korektita per piedonoto: “legu: iam”?

(e) Kaj nun venas afero pli komplika, la helpverbo **lasi**. La Zamenhofa uzado prezentas ĉi tie du tiklajn punktojn: unue, Zamenhof uzadas **lasi** anstataŭ **igi** en la okazoj, kiam tiu sufikso estus memstara (ekz-e: “li lasis poluri sian kronon” = “li polurigis sian kronon”). Tiu kromsignifo de **lasi** povas krei konfuzon apud la propra senco de tiu verbo, kiu estas “ne malhelpi”: oni povas lasi katon ŝteli viandopecon, oni ne igas ĝin ŝteli tion. Tial mi kondamnis tiun uzadon, kiel germanismon, kaj en la “Plena Vortaro”, kaj en la “Plena Gramatiko”. Tamen, se mi estus komentinta la F.K., mi estus simple farinta pri tiu punkto ian aldonan rimarkigon.

La alia punkto estas, ke post **sin lasi** Zamenhof regule uzadas infinitivon kun pasiva senco: “ŝi lasis sin peli de la ondoj” (= ŝi lasis, ke la ondoj pelu ŝin). Tiu dirmaniero, kutima en la franca kaj germana lingvoj (eble ankaŭ en slava, mi ne estas certa), estas fremda al la angla; kaj S-ro Butler, interalie, same kiel la komentintoj de F.K., akre batalas kontraŭ ĝi. Sed la kurioza afero estas, ke ambaŭ faris la saman eraron (*The British Esperantist* n-ro 597, p. 8—F.K. p. 34, n. 3) kaj atribuas mian

rimarkigon pri “evitinda germanismo” al la dua punkto, dum, en la *Plena Vortaro* ĝi klare koncernas nur la unuan.

Cetere, tiu ĉi dua punkto estas ankaŭ tre defendebla, kiel montris R. Rossetti (*The British Esperantist*, n-ro 591, p. 73): la solvo de la problemo kuŝas ĝuste en tio, ke Zamenhof konstruadas **lasi**, en ĝia propra signifo, same kiel **igi**, kies anstataŭanto ĝi estas en sia kromsignifo; “li polurigis sian kronon” povas esti analizata kiel “li igis poluri sian kronon”, kaj analoge Zamenhof skribis “li lasis poluri sian kronon”—frazo, en kiu oni ne povas (kiel asertas S-ro Butler) subkompreni ian subjekton de la infinitivo (li lasis iun poluri sian kronon), ĉar la aganto estas tiaokaze esprimata per aganto-suplemento: “li lasis poluri sian kronon de, per la ĉambelano”. Tiu uzado de **-i** kun pasiva senco ne estas pli skandala, ol la duobla eventualo ĉe la **igi**-verboj: “**igi** kun verbo signifis nek **igi**—anta nek **igi**—ata”, sed nur “**igi**—i”, sekve ĝi povas tre bone esti uzata en **ambaŭ** sencoj (aktiva kaj pasiva)” (Zamenhof, *Lingvaj Respondoj*, p. 31). Ĉiaokaze tia estas la konstanta uzado de Zamenhof, kaj mi ne opinias pravigebla, nek dezirinda la formon proponatan piednote “ŝi lasis sin esti pelata de la ondoj”.

(f) Fine, oni devas konstati, ke pluraj notoj pri la poezia parto montras surprizan nescion de kelkaj kutimaj apartaĵoj de la esperanta metriko. La komentinto ekz-e korektas (p. 420, n. 2) la version de Hamleto:

Ne helpu al vi Dio en mizero

al:

Al vi ne helpu Dio

ĉar lin ĝenis, verŝajne, skandi “al vi” kiel trokeon; sed tio estas tre malnova kaj ĉiam uzata eblo de skando, per kiu sola klariĝas la rimoj **de mi/tremi** ktp., kiuj estas oftaj en la leĝera poezio. Forstrekindaj estas do la notoj p. 322, n. 1, 378, n. 2, 392, n. 1. Ankaŭ pri la **ŝvebo** la komentinto verŝajne neniam aŭdis, kaj tial li tute malĝuste korektas:

La mond' ilin atakas sen kritiko (ĉe kiu verso “ilin” perdas sian akcenton kaj fariĝas enklitiko) al “la mond' atakas ilin” (p. 409, n. 1; vidu ankaŭ p. 415, n. 1).

Sed la plej bela ritmofuŝo troviĝas p. 427, n. 1, kie Kofman skribas jenan heksameton:

Ŝi poste li nun starigis, lin kaptis per blondkapoharoj . . .

Oni evidente devis averti kontraŭ la prepozicia uzo de **poste**; sed kial proponi jenan monstran amfibrakan komencon:

Malantaŭ li nun ŝi stariĝis . . .

dum sufiĉis tute simple forigi la -e por trovi ĝustan daktilon :

Ŝi post li nun stariĝis . . . ?

Kaj nun mi finis pri miaj, eble tro detalaj kritikoj ; mia senkulpigo estas ke ĉe tia verko, oni volus ke ĉio estu perfekta.

Restas nur al mi deziri, ke la F.K. trovu multe da aĉetantoj (nur la vesto devus ilin allogi), kaj multe da legantoj (la enhavo estas plej diversa, kaj ankoraŭ nun plejparte tre interesa). Aparte mi dezirus, ke la eminentuloj en nia movado ĝin relegu, kaj objektive konsideru. En nia tempo de malŝato al ĉia tradicio kaj de strebado al kiel eble plej granda originaleco, pluraj volas rekonstrui la Esperantan sintakson laŭ sia propra kaprico ; la fakto, ke tiun kapricon ili nomas logiko, ne sufiĉas por atingi, ke tiuj diferencaj "logikoj" kunakordiĝu. Unuj volas devigi nin konfesi, ke "ili estas tiom inteligentaj, kiom Zamenhof" ; aliaj, ke "ni devas ne konfesi tion" ; aliaj ankaŭ, ke du ne egalas du, sed nur "estas egala al du" ; tiu dediĉas sin al la ekstermado de la subjunkcioj **ĝis** kaj **dum**, tiu ĉi al la propagando de komoj antaŭ **por** ktp. Ĉiu havas sian apartan muŝon en la cerbo, sed ĉiuj egalan malŝaton por la lingva tradicio. Ĉu mi ne aŭdis la Prezidanton mem de la Esperantista Akademio aserti, en publika kunveno, ke la Zamenhofa uzado de **-ata** estas "absurda" ? Al ĉiuj tiuj sinjoroj mi respekte konsilas relegi la vortojn de Zamenhof, komence de la Antaŭparolo al tiu ĉi **fundamenta** verko, ke ĝi "*povos servi kiel modelo de esperanta stilo kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj . . . Ĉar tiu, kiu eldonas verkon en Esperanto, ne koniĝinte antaŭe fundamente kun la spirito kaj la modela stilo de tiu ĉi lingvo, alportas al nia afero ne utilon, sed rektan malutilon*". Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu !

G. Waringhien

TEJO-kongreso por gejunuloj kaj geamikoj de la junularo okazos 7-13 Aŭgusto en L'Aquila. Petu invitilon de G. Bronzetti, Via San Martino 8, L'Aquila, Abruzzi, Italujo.

ESPERANTO, Manuel d'Initiation, de Bernard Thaillet. Collection Nova, Mulhouse 1955. Prezo ne indikita.

Antaŭ nelonge artikolo de sam. A. Lienhardt, del. de UEA en Mulhouse, aperinta en Heroldo sub la titolo "En okcidento io nova", anoncis gravan iniciaton por diskonigi Esperanton en la franclingvaj regionoj. Temis pri la intenco de la firmo "Editions Nova" eldoni serion de 9 broŝuroj permesantaj laŭgradan lernadon de nia lingvo.

Nun aperis la unua broŝuro, titolita "Manuel d'Initiation". Ĝiaj 64 paĝoj poŝformataj estas prezentataj sub plaĉa dukolora kovrilo kaj donas la elementojn de la esp. gramatiko, kun ekzemploj kaj ekzercoj zorge preparitaj.

La "Manuel d'Initiation" povos ludi rolon similan al la fama "Premier Manuel" eldonita je centmiloj da ekzempleroj, kiu multe kontribuis al la disvastigo de Esperanto en Francujo.

R.L.

De la **Revuo de la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo** (19 grandaj hektografitaj paĝoj tutesperantaj kun presita kovrilo) ni ricevis n-ro 10 el 1954. Enestas tekstoj de altnivelaj paroladoj pri *Insektoj kontraŭ homoj*, *Nia alfabeto*, *Vivisekcio* k.a. Nian ekz-ron ni volonte sendos al interesato (skribu al helpred.)

Revista del Ministerio de Comunicaciones, Buenos Aires : bela, bunta gazeto grandformata, portas en la n-ro Sept.-Okt. 1954 4-paĝan il. artikolon pri Esperantaj poŝmarkoj. Mi sendos al la unua petonto.

R.R.

Ytong. 16 paĝoj, 15 × 21 cm. Eldonis la Ytong-entreprenoj en Svedujo (Yxhults Stenhuggeri AB, Hällabrottet, kaj aliaj).

Atentinda broŝureto pri "moderna konstrumaterialo" ; speco de porriĉa betono, fortika tamen prilaborebla preskaŭ kiel ligno. Multaj fotoj. Teknikaj detaloj abundas en la glate verkita teksto.

La Virgulino de la Malriĉuloj. Prof. P. Modesto Carolfi. 64 paĝoj, 17 × 12 cm., prezo 6 r.kp. Havebla ĉe la Itala Katolika Esp-ista Unio, Via Rovereto 6, Verona, Italujo.

Ĉi tiu libreto kronikas la aperojn de nia Ĉiela Patrino al simpla knabino de Banneux, Belga vilaĝo inter Liège kaj Verviers. La titolo vere estas la vortoj uzataj de Nia Sinjorino mem al la knabino, Marieta Beco, kiu tiam havis nur dek du jarojn. Ŝi ne estis studema, nek pia, sed tuj post la unua apero al ŝi de Nia Sinjorino, ŝi komencis montri tiujn emojn. La verkinto sekvas en la historio de tiu serio de ok aperoj la ĉiutagan vivon de la familio Beco, kaj estas rimarkinde, ke kiel en Lourdes kaj Fátima la Dipatrino elektis ordinaran kaj malriĉan familianon esti la ricevonto de ŝiaj deziroj kaj instrukcioj.

La lasta ĉapitro priskribas, kiel Belgaj ministoj donacis al Italaj ministoj statuon de "La Virgulino de Malriĉuloj", kaj kiel ĝin akceptis en Milano Kardinalo Schuster, por samtitola nova preĝejo. La lingvo ĝenerale estas bona kaj flua, kaj preso bonega. Troviĝas "kalma", kie laŭ mia opinio sufiĉus "trankvila" aŭ "serena". Por Katolikoj kaj Kristanoj ĝenerale la verko estas havinda, kaj mi ĝin rekomendas.

La vendprofitojn de ĉi tiu verketo oni dediĉas al la nova preĝejo.

N.V.

Internacia Konkurso 1955

Stato je la 30a de aprilo

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Japanujo ..	900	1095	121.7
2. Izraelo ..	250	290	116.0
3. Finnlando ..	2500	2720	108.8
4. Aŭstralio ..	1000	1080	108.0
5. Germanujo ..	3700	3890	105.1
6. Urugvajo ..	300	310	103.3
7. Francujo ..	5100	5096	99.9
8. Maroko ..	750	710	94.7
9. Belgujo ..	2100	1937	92.2
10. Svislando ..	1600	1455	90.9
11. Nederlando ..	4600	4155	90.3
12. Jugoslavujo ..	1750	1580	90.2
13. Kanado ..	350	315	90.0
14. Portugalujo ..	500	445	89.0
15. Hispanujo ..	1600	1420	88.8
16. Usono ..	2300	2031	88.3
17. Sudafriko ..	350	305	87.1
18. Svedujo ..	5900	4830	81.9
19. Islando ..	350	280	80.0
20. Britujo ..	9200	7210	78.4
21. Aŭstrujo ..	1200	865	72.1
22. Sarlando ..	250	170	68.0
23. Danlando ..	2500	1620	64.8
24. Meksikio ..	250	160	64.0
25. Italujo ..	2900	1830	63.1
26. Norvegujo ..	2200	1330	60.5
27. Brazilo ..	6400	3630	56.7
28. Kubo ..	250	140	56.0
29. Novzelando ..	800	390	48.8
30. Irlando ..	250	90	36.0

Donacoj por CED

	£	ŝ.	p.
Stato de la 7-a de Aprilo 1955..	73	9	7
S-ro L. Joliet, Germanujo ..		5	0
D-ro H. Wehrheim, Germanujo	1	13	4
Aŭstria Esperanto-Asocio ..	4	0	0
S-ro H. Becker, Germanujo ..		11	0
Nederlanda Esperanto-Asocio			
LEEN ..	47	0	0
F-ino M. Boulton, Britujo ..		5	0
S-ro M. Lewin, Britujo ..		11	0
Novzelanda Esperanto-Asocio..	5	0	0
S-ino Planck, Aŭstrujo ..		2	3
S-ro L. Bemaldo, Portugalujo..		5	0
S-ro R. Slot, Nederlando ..		9	6
Konversacia Klubo Hengelo,			
Nederlando ..		9	6
S-ro E. Beck, Britujo ..		10	0

Stato la 3-an de Majo 1955 £134 11 2

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Rickmansworth, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 rue de Chabrol, Paris, X, aŭ al CED mem.

NACIA ESPERANTO-KONGRESO

de la

Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko en San Diego, California

okazos de la 8-a ĝis la 10-a de Julio. La malfermiĝo okazos je la 9-a horo ptm. en la kongresejo, Hotel Manor. La programo estas ege interesa kaj enhavas 2 ekskursojn, komunan lunĉon, kaj komunan bankedon. Plenaj informoj haveblaj ĉe la Esperanto Societo de San Diego, P.O. Box 4367, San Diego 4, California, Usono.

Bruselo : Grava industria tereno, ĉ. 40 hektarojn, kun longa limo ĉe Ĝismara Kanalo. Avantaĝoj voja kaj fervoja. Vendota. Pliajn detalojn ĉe Murray-Leslie & Partners, 11 Duke Street, St. James's, London S.W.1. (Tel: WHIttehall 0288-9).

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 272

la 2an de majo, 1955

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Aprilo kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aprilo 1954 :

	1954	1955
Asociaj membroj ..	4625	3155
Individuaj membroj :		
MJ	788	733
MA	3514	3557
MS	646	729
Patronoj	7	8
DM	271	287
HM	56	57
	— 5282 —	5371
	9907	8526

DELEGITOJ

Aŭstralio

Bunbury. D : vakas.

Aŭstrujo

St. Veit a/Triesting (Niederösterreich). D : S-ino A. Tempus-Listner, Fabrikstrasse 20.

Brazilo

São Paulo (Estado de São Paulo). FD (Teozofio) : vakas.

Britujo

Nottingham. FD (Skoltismo) : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Břeclav (Sudmoravio). FD (Ornitologio) : S-ro R. Trojna, Nám. Bezruč 20.

Danlando

København. FD (Historio) : vakas.

Germanujo

Berlin. FD (Transporto) : S-ro U. Hoffmann, Berlin-Neukölln (West-berlin), Teupitzer Strasse 111. Tel: 62-43-67.

Neustadt (Weinstr.) VD : S-ro R. Ritthaler, Waldstr. 67.

FD (Turismo) : la VD.

Hispanujo

Valencia. FD (Bankaj aferoj) : S-ro R. Vizcaino, Str. Maluquer, 5.

Kanariaj Insuloj

Telde (Gran Canaria). FD (Instruado Teknika) : S-ro J. Frugoni, Porteria 2.

Nederlando

Voorburg (Zuidholland). D : vakas.

Norvegujo

Oslo. D : vakas.

Svedujo

Lidköping (Västergötland). D : A. Blomberg, lottkällsgatan 2.

VD : V. Sandberg, Erland Kafles Väg 15.

Svislando

Ascona (Tessin). D : vakas.

Entlebuch (Kt. Luzern). D kaj FD (Lignaĵoj) : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955

526. Carlouz, S-ro A., Khemisset, Maroko

527. Ehrenschwendter, S-ro H., Lenzing, Aŭstrujo

528. Meister, D-ro O., Graz, Aŭstrujo

529. Hohenwarter, D-ro P., Wien, Aŭstrujo

530. Dieudonne, S-ro M., Tarbes, Francujo

531. Dessapt, S-ro M., Thiers, Francujo

532. Lopes do Rego, S-ro M., Lisboa, Portugalujo

533. Moura Pereira, S-ro F., Lobito, Port. Okc. Afriko

534. Bastien, S-ro Generalo L., Paris, Francujo

535. de Jong, S-ro G., Huizum, Nederlando

536. Jung, S-ro T., Scheveningen, Nederlando

537. De Boes, S-ro G., Gent, Belgujo

538. Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo

539. Mooij, S-ro P. H., Brussel-Jette, Belgujo

540. Thaey, S-ro P., Zele, Belgujo

541. Farrerons, S-ro J., Bedarieux, Francujo

542. Kubler, S-ro M., Rombas, Francujo

543. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo

544. Armanis, S-ro A., Lier st., Norvegujo

545. Thorvaldsen, S-ino E., Oslo, Norvegujo

546. Bonomi, D-ro Paolo, Verona, Italujo

547. Harvey, S-ro J., Glasgow, Skotlando

548. Sharpe, S-ro L. A., Chapel Hill, Usono

549. Taylor, S-ro F. V., Albury, Aŭstralio

550. Ferrer Soler, S-ro A., La Laguna, Kanariaj Insuloj

551. Maraury, D-ro R., Malaga, Hispanujo

552. Molera Pedrals, S-ro R., Moyá, Hispanujo
 553. Coventry, S-ro W. H., Harpenden, Anglujo
 554. Morris, S-ro W., Birmingham, Anglujo
 555. Morton F-ino H. R., London, Anglujo
 556. Haus, S-ro J., Dusseldorf, Germanujo
 557. Henneberg, D-ro T., Kamen, Germanujo
 558. Metzler, S-ro D. R., Fresno, Usono
 559. Conchado, S-ro F., Brooklyn, Usono
 560. Doneis, S-ro A. F., Pharr, Usono
 561. Ela, S-ro B., Baltimore, Usono
 562. Jenkins, S-ro H. C., Philadelphia, Usono
 563. Gozal, S-ro R., Port Lyautey, Maroko
 564. Keramsi, F-ino L., Meknès, Maroko
 565. Ullrich, S-ro W., Wien, Aŭstrujo
 566. Knecht, S-ro F. P., Casablanca, Maroko
 567. Berger, S-ro B., Montevideo, Urugvajo
 568. Tato, S-ro H., Montevideo, Urugvajo
 569. Turner, S-ro F., Linköping, Svedujo
 570. Stenström, S-ro J., Jönköping, Svedujo
 571. Sjöblom, F-ino E., Astorp, Svedujo
 572. Sjöberg, S-ro H., Gnosjö, Svedujo
 573. Schöllin, S-ro O., Dyltabruk, Svedujo
 574. Näslund, F-ino E., Uppsala, Svedujo
 575. Pettersson, S-ro T., Göteborg, Svedujo
 576. Pettersson, S-ro F., Huvudsta, Svedujo
 577. Ottander, S-ro G., Östervala, Svedujo
 578. Östman, S-ro O., Flärke, Svedujo
 579. Olsson, S-ro S., Strömsnäsbruk, Svedujo
 580. Olsson, F-ino A., Göteborg, Svedujo
 581. Lind, F-ino E., Stockholm, Svedujo
 582. Lindberg, S-ro T., Prässebo, Svedujo
 583. Malmkvist, D-ro E., Bromma, Svedujo
 584. Malmkvist, S-ro A., Visby, Svedujo
 585. Malmgren, S-ro E., Stockholm, Svedujo
 586. Larsson, F-ino E., Boden, Svedujo
 587. Johansson, S-ro B., Hälsingborg, Svedujo
 588. Johansson, S-ro V. A., Göteborg, Svedujo
 589. Karlsson, S-ro E., Vilshult, Svedujo
 590. Karlsson, F-ino H., Klippan, Svedujo
 591. Jacobsson, S-ro J., Söderfors, Svedujo
 592. Hammarstrand, S-ino E. M., Vimmerby, Svedujo
 593. Harlin, S-ro G., Spangenäs, Svedujo
 594. Holmström, S-ro A., Silverhøjden, Svedujo
 595. Ericson, S-ro A., Sköldinge, Svedujo
 596. Eriksson, S-ro B., Stockholm, Svedujo
 597. Fejde, S-ro M., Nässjö, Svedujo
 598. Fingalsson, S-ro H., Gisebo, Svedujo
 599. Frode, S-ro O., Göteborg, Svedujo
 600. Gerdman, S-ro B., Stockholm, Svedujo
 601. Gustafsson, S-ro K. E., Bergvik, Svedujo

Donacoj al la Ĝenerala Kaso :

S-ino N. A. Goodliffe (Britujo) 5ŝ., S-ro J. Collier (Aŭstralio) 7ŝ. *Elkovajn dankojn.*

Donacoj al la Fondaĵo Montevideo :

F-ino M. Boulton (Britujo) 7ŝ. 6p., S-ro B. Nielsen (Danlando) 5ŝ.

Sumo ĝis 30.4.55 : £1,215 17ŝ. 2p.

Manko en la kaso : £59 15ŝ. 9p.

La elspezoj por Montevideo jam pruvis sian valoron. Montru aprobon kaj apogon per kontribuoj al forviŝo de la deficito ! Al la donacintoj, sinceran dankon.

JOHN C. RAPLEY, *Sekretario.*

Unua Universala Esperanto-Ekspozicio Montevideo 1955

Financa raporto

Enspezoj	Pesoj
Fondaĵo Montevideo ..	£250
U.E.A. ..	£150
Subvencio de la Urbestro de Montevideo ..	990:—
Donacoj :	
Urugvajaj esperantistoj ..	1.193:50
Argentinaj esperantistoj ..	97:—
E. Sonnenfeld ..	50:—
Vendo de uzita ekspozicia materialo ..	383:29
	6.250:02
Elspezoj	
Afiŝoj, hispana eldono de CED/4, grafikaĵoj, kartoj, cirkuleroj ..	2,779:—
Arango de la ekspozicio : lignaĵoj, tolaĵoj, instalaĵoj ..	1.559:—
Kostoj dum la ekspozicio : gardistoj, purigado k.t.p. ..	1,195:—
Kostoj por la enpakigo kaj konservado de la materialo ..	774:12
	6.306:12

Deficito do .. 56:10 pesoj

Rodolfo Garcia, Kasisto

Kontrolita de :

*R. A. Barbiero V. L. Cao
R. Zeballos Morales*

ANONCETOJ

Kosto : *du pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.*

La oficiala aperdato de la revuo estas la 1-a de ĉiu monato. Anoncetoj devas atingi la Centran Oficejon kvin semajnojn antaŭ la aperdato de la celata numero.

Ho mia forto, al Vi mi kantos ; Ĉar Dio estas mia defendo, la Dio de mia favoro.

Pa. 59. 17.

Instruistino pasigos la someron en Italujo kaj deziras viziti gesamideanojn kiel paganta gasto. J. Gardner, 7 Cadmus Street, NICOSIA, Cyprus.

Deziras korespondi, kun ĉiuj landoj, nur per il. pk. Certe respondos. S-ro Jean Réquillard, La Croix Moreau, VIERZON (Cher.) Francujo.

Serĉas tutmondajn korespondantojn pri filatelio kaj interŝanĝkunulojn. Mi interŝanĝas maksimumkartojn ; krome sportajn, flugajn kaj popolvestadajn uzitajn poŝtmarkojn. D-ro Paŭlo Zimányi, SÂTORAL-JAŬJHELY, Somogyi—14, Hungarujo.

Korespondado kaj interŝanĝado. Serĉas korespondantojn pri filatelio kaj interŝanĝkunulojn. Zoltáno Fehér, SÂTORAL-JAŬJHELY, Dózsa György. utca 14, Hungarujo.

Karusel-vojaĝo, tutnova sistemo de vojaĝo, speciale por esperantistoj. Petu senpagan prospekton ĉe Hans Bakker. v. Tuyll v. Serooskerkenplein 33, AMSTERDAM Z (Nederlando).

Deziras kontaktiĝi kun spertaj Esperantistoj por konversacii kaj praktiki la lingvon. D-ro S. B. Kahan, 1717 Bryant Ave., Bronx 60, N.Y., Usono. Telefonu DA 9-2230.

Dek 14-jaraj knabinoj ŝatus korespondi kĉl. Dir. A. Schneider, HAUGSDORF, Nö, Aŭstrujo.

Adressanĝo. D-ro F. Szilágyi, Mariedalsgatan 9, BORÅS, Svedujo.

S-ro Erkki Tuomanen, Simolantie 6, LAPPEENRANTA, Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun usonaj, kanadaj, aŭstraliaj kaj egiptaj samideanoj. Deziras ankaŭ bird-motivajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Sendos kompanse samvalore finnajn poŝtmarkojn laŭ iu katalogo. La anonco validas unu jaron.

Gravega Alvoko !

Universala Komerca Servo fondiĝas en Hong Kong ! Ĝi praktikas la uzadon de Esperanto en tutmondaj komercaj servoj kaj samtempe celas propagandi nian sanktan lingvon en Hong Kong ! (1) Kontaktas kun ĉiulandaj komercistoj por komerca celo ; (2) vendas ĉiujn ĉinajn kaj azialandajn poŝtmarkojn ; (3) liveras ĉiujn ĉinajn kuriozaĵojn kaj interesajn objektojn kaj aliajn varojn al tutmondaj kolektantoj ; (4) ĉiulandaj grupoj, individuoj, k.t.p. klopodas per sinceraj servoj ; (5) la kostojn ĉu en persona servado ĉu en objekto-liverado ĉiam postulas tre moderaĵojn ! (6) servas por ĉiulandaj ŝipanoj, kies ŝipoj vojaĝas Honkongon ; (7) akceptas ĉiun alian komision rilate al serveca entrepreno ; (8) bonvenigas ĉiujn enketojn pri servoj kaj liveradoj ; (9) serĉas korespondantojn kiel perantojn ĉiulande por disvastigi la servojn al tutmondaj popoloj (ĉiuj kondiĉoj interkonsilataj) ! BONVOLU HONORIGI, SUBTENI, HELPI, FAVORIGI KAJ KOMISII AL LA ORGANIZO, tutmondaj esperantaj grupoj kaj gesamideanoj ! Ĉion skribu AERPOŝTE al S-ro Wong Ling Kai, 72 Lockhart Road, 1st Floor, HONG KONG. Represado kaj disvastiga prezentado petata kaj dankata ! Okaze de enketoj bonvolu aldoni respond-kuponon ! Nepre respondos al ĉiuj enketantoj !

Bezonataj, flegistinoj por mensmalsanejo, bone-edukitaj, aĝo 18-32 jaroj. Por informoj, skribu al The Medical Superintendent, Carlton Hayes Hospital, NARBOROUGH, near Leicester, Anglujo.

SE VI SKRIBAS al la Dana ambasadejo de via lando, vi povas ricevi 8-paĝan raporton pri la fama aŭtoro H. C. Andersen. Tiu ĉi tre interesa verko de S. M. Kristensen, esperantigita de G. Kuhlmann, meritas specialan vesperon en la kluba programo. Nepre petu ĝin.

Ido kiel lingva projekto jam ne estas aktuala. Sed la idismo, la ŝajnlogiko ankoraŭ minacas difekti nian lingvon — ĉiu esperanto!

Dr. ...

El la recenzoj :

SAT-AMIKARO : Ne nur gramatikemuloj, sed ankaŭ laikuloj trovas en ĝi trafajn argumentojn kontraŭ la novmodajn esprimojn kaj ĝue tra legos ĉiujn paragrafojn forte stampitajn de agnosko al la admirinda lingva intuicio de Zamenhof
REVUO ESPERANTO : Nur ĉe ĝia apero en libra formo oni povis ĝuste taksii ĝian valoron espereble tio sufiĉos por instigi almenaŭ ĉiun instruiston kaj verkanton de lernolibro aĉeti ĝin.

140 paĝoj broŝurita. Bona papero. Prezo sv. Kr. 4.40 inkl. sendkostoj de la eldoninto :

Erik Carlén,

Hällabrottet, Svedujo, poŝtĝiro 343481,

aŭ ĉe via nacia Esp. eldonejo aŭ ĉe la libroservo de U.E.A.
Prezo 6ŝ., afranko 4p.

Fervoja Terminaro

E. M. Rosher 67 paĝoj .. 2ŝ. 2p. : 6 rpk.

Kudra kaj Trika Terminaro

M. & V. Verda 22 paĝoj .. 10p. : 2 rpk.

Marista Terminaro

K-to P. Clissold 62 paĝoj .. 1ŝ. 8p. : 5 rpk.

Matematika Terminaro

D-ro C. M. Bean 39 paĝoj .. 1ŝ. 8p. : 5 rpk.

La prezoj inkluzivas afrankon

Mendu ĉe U.E.A. aŭ via enlanda libroservo



“La traduko de Haugen estas unuaranga poezia travivaĵo” — R. Rossetti

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,

Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe

U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo